

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

4 1984





En la loko loĝata



Hania knabino plukanta te-foliojn


800-jara te-arbo



de Hani-oj

960 000 hani-oj vivas ĉefe en suda Yunnan-provinco ĉe la subtropika zono. La loko havas mildan klimaton, multan pluvon, fekundan teron taŭgan por agrikulturaj plantaĵoj kaj fame konata Puer-teo.

Fotoj de LAO BAI



Hania vilaĝo



Hanioj en fumado



Hania knabino laboranta en te-preparejo





Hanioj en fumado



Hania knabino laboranta en te-preparejo





Du-etaĝa ligno-domo loĝata de hanoj. Ĝia supra etaĝo servas por dormado, kaj ekster la ĉambroj estas vasta balkono. La foto montras, ke virinoj sur la balkono elektas printempan teon.

Haniaj element-lernejanoj



Hania maljunulino
en foiro





Geamantoj

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto:
Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)
Esperanta Sekcio
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Hani-aj knabinoj en brodado. Hani-nacieco estas unu el la ĉinaj nacimalplimulto. Por informiĝi pri ĝi bonvole rigardu la antaŭajn kolorajn paĝojn en tiu ĉi numero de nia revuo.

Foto de **QU WEIBO**

SUR LA DORSKOVRILLO:

Antaŭ la Printempa Festo

Olepenetraĵo de
JIANG BAOXING

Printempa Festo estas tradicia festo de Ĉinio, kiu okazas en la unua tago de la unua monato laŭ la ĉina lun-kalendaro. La penetraĵo montras kamparaninon kun nov-jara bildo kaj festaj bezonaĵoj en foiro.

KOLORAJ SERIOJ:

En la loko loĝata de Hani-oj
La monto Fenikso
Fotografitaĵoj de esp-istoj
La urbo Zhangjiakou
Dancoj akompanataj de Gamosonorilaro

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Riĉa rikolto de grenoj kaj kotonno de Ĉinio en 1983
Specialigitaj kamparanaj familioj
Studentinoj en dimanĉo

Enhavo

La kvina riĉrikolta jaro	2
Radikala reformo en la kamparo de Wenjiang-gubernio	4
Interparolado kun kamparano Zhang Wenkang	7
Materia kaj kultura vivo de ĉinaj oficistoj kaj laboristoj	10
KURANTAJ AFEROJ	46
Sude kaj Norde de la Granda Muro (4): Ĉe la urbo Zhangjiakou	50
Vigliĝanta Esperanto-movado en Afriko	13
D-ro Maier kaj lia edzino — amikoj de ĉinaj esperantistoj	15
POR KOMENCANTOJ: Eksterordinara donaco	19
SUR NIA LIBROBRETO	20
ESP-NOVAĴOJ	16
Pontoj naskiĝis en ŝiaj manoj	21
Vojo al la homa koro	30
MIA VIVO: Sur la ĝusta vojo	25
Tutlanda filatelo-ekspozicio de Ĉinio	27
Loko aspirata de islamanoj	35
Muziko kaj danco antaŭ 2 400 jaroj	32
Papilia fonto	40
VIDINDAJ LOKOJ: La feniksa monto	25
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La naskiĝo de la Norda Song-dinastio kaj ekonomia disvolviĝo	37
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Nacia himno de Ĉinio	42
POR VIA SANO: Korpo-ekzercaj terapioj kontraŭ skapola periartrito	44
ĈINLINGVA KURSO: Kvara leciono	49
KORESPONDI DEZIRAS	47

JARABONTARIFO		FR Germanio	DM	14.00	Italio	Lit	6000.00	Portugalia	Esc.	500.00	
Aŭstralio	\$A	Britio	£	4.00	Japanio	Yen	1400.00	Svisio	SF	12.00	
Aŭstrio	Sch	Finnlando	FMK	30.00	Jugoslavio	Din.	200.00	Usono	US\$	6.00	
Belgio	BF	Francio	FF	40.00	Nederlando	Gld.	16.00	Kanado	Can\$	7.50	
		Hispanio	Pts	700.00	Nov-Zelando	NZ\$	8.00				
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	4.00	US\$	6.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	2.80	US\$	4.00

LA KVINA RIĈRIKOLTA JARO

EN 1983, Ĉinio akiris la kvinan el la sinsekvaj riĉaj rikoltoj en agrikulturo. Ĉiuj planoj de produktokvantoj de la ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj estis plenumitaj. La produktokvantoj de greno, koton, sukero, brutobredaĵoj kaj akvo-produktaĵoj ĉiuj superis la plej altajn nivelojn en la historio kaj interalie la totala produktokvanto de greno atingis 380 milionojn da tunoj, kio estas 107% de tiu en la riĉrikolta jaro 1982.

En 1983, la plantaĵoj de pli ol 40 milionoj da hektaroj en Ĉinio, en ŝlosila kreska periodo, estis trafitaj de inundo, sekegeco, ŝtormo kaj hajlo. Dank' al la praktiko kaj disvolviĝo de la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado en la vasta kamparo, la kamparanoj povis plene utiligi la memdecidan rajton en la produktado kaj sekve disvolviĝis ilia granda produkta aktiveco. Helpate de la ŝtato, ili aplikis diversajn rimedojn kontraŭ la katastrofoj kaj por plipro-

duktado, ili finfine venkis ĉiajn naturajn katastrofojn kaj akiris la agrikulturan riĉrikolton, sur la bazo de la pliprodukto en sinsekvaj 4 jaroj. Aparte granda estis la pliprodukta kvanto de greno en la norda regiono de Ĉinio, kie la katastrofoj estis malpli seriozaj, ekz. nur en Henan-provinco 5 milionoj da tunoj da greno estis pliproduktitaj ol en 1982. La produktokvantoj de greno de plejparto de la regionoj, trafitaj de gravaj katastrofoj, estis aŭ egalaj al aŭ pli grandaj ol tiuj de 1982. En la provincoj Jiangxi, Guangdong kaj Hunan, pliproduktiĝis respektive 175 000 tunoj, 250 000 tunoj kaj 750 000 tunoj da greno, kaj kreiĝis rekordoj de produktokvanto de greno. Kvankam pli ol 100 gubernioj de Sichuan-provinco estis trafitaj de katastrofoj, iuj eĉ de pereiga, tamen la kvanto de la produktita greno de la tuta provinco pliiĝis je miliono da tunoj kompare kun tiu en 1982.



Kamparano Zhang Yuanfang (dekstre) faras eksperimentadon en la kampo por hibridigi tritikon.



Riĉa rikolto de greno en Lianshui-gubernio, Jiangsu-provinco en 1985

Nun, en Ĉinio pli ol 99% el la produktaj taĉmentoj jam praktikas la respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado. En grenproduktado, 50 produktaj bazlokoj de komerca greno helpataj de la ŝtato kaj la kamparanaj familioj de faka produktado en diversaj lokoj ludis ĉefan rolon. En Datong-gubernio de Shanxi-provinco, la familioj de faka gren-produktado konsistigantaj 7% de la agrikulturaj familioj de la nomita gubernio liveris al la ŝtato 75% de la komerca greno de tiu gubernio, t. e. 1.9-oblo de la planita kvanto de la aĉetenda greno de la tuta gubernio. En 1983, 6 produktaj bazlokoj de komerca greno en Huaide kaj aliaj gubernioj en Jilin-provinco, helpataj de la ŝtato, pliproduktis pli ol milionon da tunoj da greno ol en 1982 kaj liveris 50% de la totala kvanto de komerca greno de la tuta provinco.

La ĝenerala efektivigo de la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado stimulis la entuziasmon de la vasta kamparanaro en lerno kaj apliko de agrikulturaj teknikoj, kaj ludis tre gravan rolon en akiro de agrikultura riĉa rikolto. En 1983 ĝenerale fondiĝis en la kamparo teknikaj kursoj, kiuj trejniis grandan nombron da agrikulturaj teknikistoj. En 140 gubernioj de la tuta lando fondiĝis centroj por disvastigo de agrikulturaj teknikoj, kiuj akcelis agrikulturan sciencan.

Ekz. dank' al apliko de hibridigitaj bonaj specioj de rizsemo, la unufoja hektara produktokvanto de pli ol 6 600 000 hektaroj superis 500 kilogramojn. La grandarea apliko de hibridigita bonspecia rizsemo alportis al la provincoj Guangdong kaj Jiangxi riĉan rikolton, eĉ en jaro de gravaj katastrofoj. Krome, multe disvolviĝis ankaŭ racia apliko de sterko, kompleksa prevento kaj elimino de plantaj malsanoj kaj fiinsektoj, kaj apliko de plasta membrano por kovri la kampojn kulturantajn rizplantidojn.

Por garantii ampleksan riĉan rikolton, en 1983 la ŝtato racie reguligis la kulturelan planon de agrikulturaj plantaĵoj kaj sian aĉetan politikon pri parto de agrikulturaj produktaĵoj, racie pliiĝis la kulturelan areon de greno, fundamente efektivigis laŭplanan produktadon de la ĉefaj agrikulturaĵoj greno, kotono, manĝoleo, sukero, tabako kaj akordan disvolviĝon de agrikulturo, forstumado, brutobredado, fiŝado kaj aliaj flankokupoj. Samtempe, la ŝtato donis fortan subtenon al la agrikulturo en financo kaj materio, kaj pliiĝis la materian investon al la agrikultura produktado. La kvanto de uzita kemisterko pliiĝis en 1983 je 9.3% ol tiu en 1982, kaj iom pliiĝis ankaŭ la provizado de dizeloleo por agrikultura uzo, insekticidoj kaj aliaj industriaj produktaĵoj.



Wanchun-vilaĝo de Wenjiang-gubernio

ZHENG ZHENJIE:

Radikala reformo en la kamparo de Wenjiang-gubernio

EN urbo mi multfoje aŭdis, ke post praktiko de la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado multe altiĝis la aktiveco de la kamparanoj en produktado kaj pliboniĝis ilia vivo. Kial oni praktikas en la ĉina kamparo la sistemon? Kiaj estas ĝiaj trajtoj kaj per kio ĝi diferencas de la antaŭa individua ekonomio? Por trovi la respondojn, mi vizitis la kamparon de Wenjiang-gubernio en Sichuan-provinco en la pasinta jaro.

NASKIĜO DE LA SISTEMO

Estis vintro, kiam mi venis al Wenjiang-gubernio. Mi rigardis eksteren tra la trajna fenestro kaj vidis nek glacian nek neĝon. La aero estis humida. Matene ĉie regis maldika nebulo, kiu mala-

peris post la deka antaŭtagmeze, kaj elmontriĝis verdaj kampoj.

Kiam mi vizitis respondeculon de la gubernio, mi demandis lin: “Kiel naskiĝis kaj disvolviĝas la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado?”

Meditinte momenton, li respondis: “Por ekspliki la demandon, mi devas paroli unue pri la formoj de kolektiva kampara ekonomio praktikataj en la pasinteco en Ĉinio.”

Li diris, ke post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la kamparanoj fariĝis mastroj de la tero. Kaj tuj poste la popola registaro kondukis ilin sur la kooperigan ojon. Reformado de la individua ekonomio de la kamparo en la socialisman kolekti-

van ekonomion multe akcelis la disvolviĝon de produktado. Sed la problemo kuŝis en tio, ke la altgrada agrikultura kooperativo starigita post la kooperigo kaj la popola komunumo starigita en 1958 praktikis multajn konkretajn metodojn en produktado, distribuado kaj administrado, ne konvenajn al la ĉinaj cirkonstancoj kaj malutilajn al la pluapaŝa disvolviĝo de produktado.

Tiam, ĉiutage la komunumanoj devis kolektiĝi por aŭskulti laboraranĝon faritan de la estro de produkta taĉmento kaj poste kune iris al kampo labori. Preskaŭ ĉiuj rajtoj pri la produktado kaj administrado estis en la manoj de kelkaj kadroj. Pro tio la komunumanoj ne povis elvolvisian administran talenton kaj

iniciatemon. Ĉar la administra nivelo de kamparaj kadroj estis malalta, ili neeviteble donis arbitrajn kaj neefektivigeblajn instrukciojn.

La jarfina distribuado estis farita laŭ la totalaj laborpoentoj de ĉiu komunumano. Kvankam la manieroj por kalkuli laborpoentojn estis diversaj, tamen ili estis ne tute raciaj. Krome, la komunumanoj sciis nur, kiom da laborpoentoj ili gajnis ĉiutage, sed ne sciis la valoron de ĉiu laborpoento. La malŝparo en la produkta administrado kaj la malversacio de malmultaj kadroj nature reduktis la valoron de laborpoento. Tial kamparanoj diris: "Post unujara diligenta laboro ni gajnis kompatindajn monsumon kaj kvanton da greno." Unuvorte, laŭ la laborpoenta sistemo, tiu, kiu laboris multe, ofte ne gajnis pli multe ol tiu, kiu laboris malmulte. Jen praktika egalrajtismo en la pasinteco.

Li diris al mi, ke jam en la posta periodo de la kooperativismo la supre diritaj mankoj aperis kaj fariĝis pli kaj pli evidentaj poste. Dume la popola registaro kaj popolamasoj alprenis diversajn rimedojn por ilin likvidi. Ekz., komence de la 60-aj jaroj oni praktikis la sistemon de respondeca kampo kaj akiris bonan efikon. Sed influate de la "maldekstraj" pensoj, precipe en la dekjara kaoso de la kultura revolucio, la sistemo kaj aliaj similaj rimedoj estis abolitaj. Tio serioze damaĝis la aktivecon de la kamparanoj kaj malrapidigis la disvolvigon de agrikultura produktado. Kaj en 1976, la ŝtato eĉ devis enporti al Sichuan-provinco, "surtera paradizo", 600 000 tunojn da greno el aliaj provincoj.

Finiĝis la dekjara kaoso kaj oni komencis reguligi la agrikulturajn politikojn, la kamparanoj penis anstataŭigi la egalrajtisman en la kolektiva ekonomio per nova produkta formo. En 1978 oni unue praktikis respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado en la provinco Sichuan, tion aprobis Zhao Ziyang, la tiam unua sekretario de la provinca partia komitato kaj la nuna ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. La kamparanoj ricevis parcelon da tero per interkonsento laŭ la respondeca sistemo, ili havas terkulturan rajton, kio multe akcelis ilian aktivecon kaj rapide revigligis la produktadon. Dum la lastaj jaroj, la sistemo estis akceptita de la kamparanoj ne nur de Wenjiang-gubernio, de Sichuan-provinco, sed ankaŭ de la tuta lando.


TRAJTOJ DE LA SISTEMO

Laŭ la sistemo la kamparanoj

povas disponi parcelon da tero, brutojn kaj agrikulturilojn laŭ kontrakto kaj ili devas pagi agrikulturan imposton al la ŝtato kaj doni malgrandan monsumon al la kolektiva fonduso.

La sistemo forme iom similas al la pasinta individua ekonomio, sed esence estas socialisma. La ĉefaj produktaj rimedoj, kiaj kampoj, montoj kun iliaj arboj, irigaciaj instalaĵoj apartenas al la kolektivo kaj estas protektataj de la leĝo, la kamparanoj ne rajtas luigi aŭ vendi ilin, sed en la periodo de individua ekonomio, la individuaj kamparanoj posedis la teron. La kontrakto difinas kvanton kaj specojn de agrikulturaj produktaĵoj, kiujn kamparanoj devas vendi al la ŝtato, kio metis la produktadon de individuaj kamparanaj familioj en la ŝtatan planon. La pasintaj individuaj kamparanoj ne havis tian devon. En la distribuado de

En la hidroelektrejo de Shou'an-distrikto de Wenjiang-gubernio



agrikulturaj produktaĵoj la ŝtato praktikas la principon: Laŭ leĝo vendi al la ŝtato, laŭ kontrakto doni al la kolektivo kaj proprigi ĉion ceteran al si mem. Sed en la pasinteco la individuaj kamparanoj pagis al la ŝtato nur agrikulturan imposton kaj havis nenian devon al la kolektivo. Krome, la ŝtato povas konduki la kamparanojn per industrio, komerco, kredito, prezo kaj imposto al disvolvo de la agrikultura produktado por servi ilin al la socialisma konstruado.

POST EFEKTIVIĜO DE LA SISTEMO

Post efektiviĝo de la sistemo multe altiĝis la laborentuziasmo de la kamparanoj de Wenjiang-gubernio. Ili povas terkulturi laŭ la bezono de la ŝtato kaj kiel eble plej multe disvolvi sian talenton, sekve de tio ege pliboniĝis ilia vivo. Mi vizitis la familion de 38-jara Wang Yongdi, kampulo de la vilaĝo Kuzhu de la gubernio. Li kaj lia edzino

havas du infanojn. Ili kulturas dekonon da hektaro da kampo per kontrakto kaj 1/50 hektaron da kampo por privata uzo.

De sia infaneco li ŝatas kulturi florojn. Tamen en la pasinteco estis malpermesate entrepreni flankokupojn krom grenproduktado. Kvankam Wang estis sperta en kulturado de floroj, tamen li povis kulturi florojn nur ĉirkaŭ sia loĝejo.

Post efektiviĝo de la sistemo en la kamparo, petinte konsenton de la produkta taĉmento li ekokupiĝis pri kulturado de floroj kaj aranĝado de envazaj pejzaĝoj. En la pasintaj tri jaroj lia familio ĉiujare pagis al la ŝtato kaj kolektivo 3 000 juanojn (egale al ĉ. 1 500 usonaj dolaroj) laŭ la kontrakto, ĉiujare li nete enspezis ĉ. 10 000 juanojn. Lia familio fariĝis riĉa kaj aĉetis vestojn, meblojn, biciklon kaj brakhorloĝojn, radio-magnetofonon, elektran ventumilon, koloran televidilon k. a. Krome, li konstruis al si duetaĝan domon. Las-

tatempe li donacis al la komunuma mezlernejo 10 000 juanojn por ripari ĝiajn lernoĉambrojn. Mi estis forte kortuŝata, starante antaŭ lia nova domo ĉirkaŭata de belaj floroj kaj pensante, ke en la estinteco la pokapa jarenspezo en lia produkta taĉmento estis nur 72 juanoj. Kiel granda ŝanĝiĝo okazis!


Poste mi veturis al Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan-provinco. Respondeculo de la provinca partia komitato diris al mi, ke en 1983 la totala grena produkto-kvanto de la provinco atingis 38.35 milionojn da tunoj kaj oni vendis al la ŝtato 7 milionojn da tunoj da greno.

NOVA TENDENCO

De la antikveco la ĉinaj kamparanoj alte taksas teron, opiniante ke ĝi estas la unika bazo por ilia vivo kaj fonto por ilia riĉiĝo. La efektiviĝo de la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado kaj senĉesa altiĝo de la labor-produktiveco estigis superfluan laborfortojn en Wenjiang-gubernio, samkiel en aliaj regionoj de Ĉinio, kie la loĝantaro estas multnombra kaj agraro malgranda. Oni diris, ke triono de la kamparanoj de la gubernio estas senokupa.

Tio estas grava problemo. En iuj landoj la natura rimedo por solvi la problemon estas lasi tiujn senokupajn kamparanojn iri al urboj por serĉi laboron. Sed la ĉina registaro aplikis alian rimedon: permesi kaj kuraĝigi senokupajn kamparanojn entrepreni diversan kulturadon (kultivi legomojn kaj florojn ĝenerale en la gubernio), bredadon (bredi kokojn, anasojn, anserojn, porkojn, kokojn, kaprojn, kuniklojn, abelojn kaj fiŝojn), prilaboradon kun agrikulturaj

Wang Yongdi kaj lia edzino antaŭ sia etaĝdomo



Interparolado kun kamparano Zhang Wenkang

SURVOJE al la Yongquan-a Popola Komunumo de Wenjiang-gubernio, mi vidis plurajn duetaĝajn domojn. Mia voĵgvidanto, montrante ĵus finkonstruitan duetaĝan domon ĉe kanaletu ombrita de verdaj bambuaroj kaj salikoj, diris al mi: "Tio estas domo de Zhang Wenkang, lia familio estas familio de faka produktado."

produktaĵoj kiel materialoj, transportadon, komercon kaj mangoservojn.

Tiel ne nur solviĝis la problemo pri superfluo de laborfortoj, sed ankaŭ vastiĝis la socia labordivido kaj leviĝis la elcento de la komercaj produktaĵoj. Laŭ statistiko, en Wenjiang-gubernio la familioj okupataj speciale pri brutobredado, kulturado kaj aliaj entreprenoj produktis kelkoble, eĉ dekoble pli multe da komer-

caĵoj ol la ordinaraj kamparanaj familioj.

La efektivigo de la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado multe ŝanĝis la ĉinan kamparon kaj formis varian plurtaŭolan ekonomian strukturon. Tial oni povas diri, ke la sistemo estas ne provizora rimedo por solvi la problemon pri la vivtenado de la kamparanoj, sed radikala reformo al la kampara ekonomia strukturo, kiu ha-

La familio de faka produktado estas tia kamparana familio, kies ĉefaj laborkapabluloj aŭ ĉiuj membroj sin okupas speciale pri kulturado aŭ bredado, aŭ tia familio, kiu sin turnas de kampa laborado al prilaborado, komercado, manĝejoj-funkciigado, transportado aŭ aliaj profesioj. La gubernio havas 9 000 diversajn kamparanajn familiojn de faka produktado, t.e. 20 procentoj de la totala nombro de la kamparanaj familioj. Kaj la procento estas ankoraŭ kreskanta.

Mi havis interesan interparoladon kun Zhang Wenkang, 36-jara kamparano.

Demando: Kiom da membroj en via familio? Kaj pri kio ili sin okupas?

Respondo: Sume kvar: mia edzino, mi kaj du infanetoj. Mi kultivas tomaton, mia edzino bredas porkojn kaj prizorgas dommastrumadon, ankaŭ ŝi ofte helpas min en kampa laboro.

D: Kiom da agroj vi laŭkontrakte kultivas nun?


R: Mi kultivas 0.15 hektaron da agro.

D: Kio inspiris al vi kultivi tomaton?

R: Nia regiono havas altajn temperaturon kaj humidecon, la tomato ĉiam suferas de fiinsektoj kaj diversaj malsanoj, tial oni ne povas sufiĉe provizi merkaton per tomato, precipe en la postsezono. Informiĝinte pri tiu stato de la merkato, mi aĉetis kaj mendis multajn librojn pri

vas gravan signifon por konstrui la socialismon kun ĉina karaktero.





La etaĝdomo de Zhang Wenkang, konstruita en 1982

tomata kultivado, por fari kontribuon al la popolo en tiu flanko.

D: Ŝajne vi estas bone klerigita.

R: Ne, tute ne. Mi estis eĉ ne diplomita de elementa lernejo. En la komenco mi renkontis nekonatajn vortojn en libroj kaj revuoj kaj legis ilin kun helpo de vortaro. Kelkfoje mi iris al koncerna agronomia institucio por konsulti fakulojn. Mi ankoraŭ bone memoras jenan aferon: Foje dum florado la folioj de miaj tomatoj ekvolviĝis kaj flaviĝis. Komence, mi misprenis tion kaŭzita de malsano kaj fiinsektoj kaj uzis kelkfoje insekticidon, sed tio efikis neniom. Mi maltrankviliĝis kaj, kun iom da grundo kaj flavaj folioj, hastis al la gubernia urbo por peti fakulon fari kemian analizon. Fakte la flaviĝo kaj volviĝo de tomatoj folioj estis kaŭzitaj de manko de mikroelemento mangano. Post aldono de mangana sterko la tomatoj folioj rapide reverdiĝis.

D: Ĉu vi havas kontraktan dokumenton?

R: Jes, mi havas.

D: Ĉu mi povus legi ĝin?

R: Kompreneble.

D: La kontrakto kondiĉas, ke vi devas pagi al la taĉmento 1 000 juanojn (500 usonaj dolaroj) ĉiujare. Ĉu vi povas plenumi tion?

R: Jes, mi povas. En 1981 la enspezo de mia familio atingis 4 376 juanojn. Kaj en la printempoj de la jaroj 1982 kaj 1983 mi uzis novan teknikon — grundo-kovrado per plasta membrano en mia tomata kampo kaj kultivis 11 sub-speciojn de tomatoj anstataŭ la antaŭaj du. La produktokvanto kelkoble altiĝis. En la lastaj du jaroj nia jara enspezo en la agrikultura kaj helpokupa produktado atingis 10 000 juanojn.

D: Kia estis la stato antaŭ la praktikado de produkta respondeca sistemo en la kamparo?

R: Tiam en la kamparo oni praktikis la politikon “preni grenan produktadon kiel la ĉefan”. Kvankam mi ŝatis planti tomaton, tamen mi povis kultivi ĝin ĉirkaŭ la domo nur post kampa laboro, por nia propra konsumo. Kelkiam mi vendis iomete por kovri la elspezon de ĉiutagaj bezonaĵoj.

D: Ĉu tiu ĉi duetaĝa domo estas konstruigita de vi sola?

R: Ne. Ĝi estas konstruita de mi kaj alia familio.

D: Kiom da ĉambroj via familio havas?

R: Kvin ĉambrojn kun plankareo de minimume 80 kvadrataj metroj.

D: Kiam vi konstruis ĝin?

R: En 1982.

D: Kiom da mono vi elspezis por ĝi?

R: 5 600 juanojn.

D: Ĉu vi ŝuldas pro la domkonstruado?


R: Mi prunte prenis de la Agrikultura Banko 2 000 juanojn, sed baldaŭ mi kovris la ŝuldon.

- D: Ĉu vi aĉetis meblojn kaj aliajn necesajojn en la lastaj jaroj?
- R: Krom mebloj kaj vestoj ni aĉetis ankaŭ du biciklojn, du brakhorloĝojn, radio-ricivilon kaj stebmaŝinon. Kaj ni ankoraŭ intencas aĉeti koloran televidilon.
- D: Ĉu viaj najbaroj ne envias vin pro via riĉiĝo?
- R: Neniu. Ĉar la nova sistemo malfermis al ĉiuj familioj la pordon al riĉiĝo. Kompreneble, iuj familioj havas pli da enspezo ol aliaj pro diferenco de laborfortoj, tekniko kaj nombro de nelaborkapablaj familianoj.
- D: Ĉu denove aperos dupolusiĝo de la riĉaj kaj malriĉaj kamparanoj?
- R: Laŭ mia opinio, tio ne okazos. Ĵus mi jam diris, ke riĉiĝo de iuj kamparanaj familioj baziĝas sur la ĝenerala kresko de enspezo de multaj kamparanaj familioj. Tio esence malsamas de la granda diferenco inter la riĉaj kaj malriĉaj kamparanoj kaŭzita de ekspluatado fare de bienuloj al kamparanoj antaŭ la Liberiĝo.
- D: Kiom enspezas la aliaj kamparanoj en via taĉmento?
- R: Antaŭ la efektiviĝo de la produkta respondeca sistemo, ĉiu en nia taĉmento

akiris 65 cendojn por ĉiu labortago. La taĉmento preskaŭ ĉiujare devis pruntepreni de la kredita kooperativo de la komunumo 7 000 — 8 000 juanojn. Sed nun ni neniom ŝuldas al la ŝtato. Nun, post pago de imposta greno de 20 000 kg. al la ŝtato, preskaŭ ĉiu familio enspezas ĉ. 2 000 juanojn jare.

- D: Ĉu troviĝas familio, al kiu mankas laborkapabluloj aŭ kies familiano malsanas?
- R: Estas unu tia familio. Ĝia mastro nomiĝas Yang Guangnong. La familio havas tri membrojn. La edzino suferas de kormalsano kaj tial li ŝuldis al la ŝtato 500 juanojn. En la lastaj jaroj ankaŭ li laŭkontrakte kultivis parcelon da agro. La taĉmento prenis lian familion kiel malfacilan familion. La provizaj unuoj unue vendis al li ĥemian sterkon kaj bonkvalitan semon. En riz-prikla sezono liaj parencoj, amikoj kaj aliaj samvilaĝanoj venis al li por helpi. Ankaŭ mi donacis al li 1 600 tomatplantidojn kaj 1 700 florbrasikplantidojn. En 1983 lia familio enspezis 1 430 juanojn kaj planis konstrui novan domon.
- D: Mia lasta demando estas: Nun la registaro permesas al unu geedza paro havi unu infanon. Laŭdire, post la efektivigo de produkta respondeca sis-

Zhang Wenkang (meze) parolas pri sia sperto en kultivado de tomatoj sur la kampo.



Materia kaj kultura vivo de ĉinaj oficistoj kaj laboristoj

NUN en Ĉinio estas 110 milionoj da oficistoj kaj laboristoj. La ĉina registaro turnas grandan atenton al iompostioma plibonigo de ilia materia kaj kultura vivo kondiĉe de disvolvo de produktado. Dum la kvar jaroj 1979-1982, la meznombra salajro de la oficistoj kaj laboristoj de la tuta lando kreskis je 25.7%, kaj pli ol 30 milionoj da senlaboraj urbanoj ekhavis oficon. Dank' al altiĝo de salajro, multigo de salajratoj kaj pliigo de monpremio post la praktikado

** La aŭtoro estas vicprezidanto de la Tutĉinia Federacio de Sindikatoj.*

de respondecaj sistemoj en entreprenoj, grandmezure multiĝis la enspezo de la familioj de oficistoj kaj laboristoj. Ekskluzive de la faktoro de prez-altiĝo, la meznombra monata enspezo de ĉiu oficisto aŭ laboristo efektive kreskis je 30.8% dum tiuj kvar jaroj.

Kompreneble, la salajro kaj viv-nivelo de ĉinaj oficistoj kaj laboristoj estas malaltaj en komparo kun tiuj de la evoluintaj landoj. Tamen en Ĉinio oni ĝenerale ne pagas enspezan imposton, male, ricevas diversajn subvenciojn de la ŝtato. La sumo de tiuj subvencioj por ĉiu jaro egalas ĉirkaŭ 80% de la totala

sumo de salajroj. De 1979 ĝis 1981, nia ŝtato elspezis 62.8 miliardojn da janoj (1 jano egalas proksimume 1/2 US dolaron) por kovri la saldon de varprezoj de ĉiutagaj vivbezonaĵoj por urbanoj, monhelpi ilin en lupagoj de domoj kaj fari sociajn bonstatigajn aferojn. Ni prenu lupagon de domo kiel ekzemplon. Ĝenerale, ĝi okupas nur 3% de la familia enspezo de ĉinaj oficistoj kaj laboristoj. Por unu kvadrata metro da loĝareo, la ŝtato postulas la pagon de nur 0.1 jano, tamen pagas almenaŭ 0.38 janojn por deprecado, riparado kaj administrado. Krome, la oficistoj kaj laboristoj de nia lando ricevas monhelpon de la

temo, iuj volas plian infanon se la unua naskito estas ina, por havigi al si laborkapablulon. Krome, estas tia fenomeno, ke lernantoj longtempe forestas de lernejo por helpi sian familion en produktado. Ĉu estas tia afero ĉi tie?

R: Tia afero ne okazas ĉi tie. Naskolimigo renkontas nemalmultajn malfacilojn. Precipe iuj maljunuloj estas ĉiam katenitaj de la malnova penso "ju pli da infanoj, des pli da feliĉo". Sed granda parto de la kamparanoj volas praktiki naskolimigon, post senĉesa persvado

de la registaro kaj efektivigo de monpunoj.

D: Ĉu estas virino en via vilaĝo, kiu naskis duan infanon?

R: Nia taĉmento havas 40 familiojn, ekde la jaro 1976 neniu el ili naskis duan infanon.

Kiam mi adiaŭis Zhang Wenkang, jam estis la tria posttagmeze. Kun kreskanta intereso mi veturis al la vilaĝo Fenikso por viziti kamparanajn kokobredejojn. Oni diris al mi, ke en la gubernio 1 400 familioj bredas kokojn kaj en 1983 la nombro de bredataj kokoj atingis 620 000.

ŝtato aŭ entreprenoj, ankaŭ por akva kaj elektra konsumo, infanvartado, trafiko, varmigo, parenco-vizita vojaĝo, bano kaj razo.

Kun multigo de enspezoj, senĉese altiĝas la konsuma nivelo kaj ŝanĝiĝas la konsuma strukturo de la familioj de oficistoj kaj laboristoj. Ili havas pli altan postulon por vesto, manĝo, loĝo kaj veturo. Nun preskaŭ ĉiuj familioj de urbaj oficistoj kaj laboristoj posedas kudro-maŝinon, radio-aparaton, biciklon kaj nigra-blankan televidilon. Sendube, iuj familioj vivas ne tiel bone pro multeco de vivtenatoj aŭ ia alia kialo. La administracioj kaj sindikatoj de entreprenoj tre zorgas ilin kaj efektive helpas ilin solvi la malfacilojn per subvencio aŭ amasa reciproka monhelpo.

Dum la lastaj jaroj rimarkinde pliboniĝis la kondiĉoj de loĝado kaj viva bonstatigo de ĉinaj oficistoj kaj laboristoj. De 1979 ĝis 1982, la ŝtato asignis grandan sumon por konstrui loĝdomojn

de oficistoj kaj laboristoj, kies areo egalas duonon de la totala areo de la loĝdomoj konstruitaj dum 29 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949. Sole en 1982, oni jam konstruis tiajn loĝdomojn kun areo de 117 900 000 kvadrataj metroj. Krome, niaj ŝtato kaj entreprenoj starigis multajn kuracejojn, sanitarejojn, infanvartejojn, komunajn manĝejojn kaj aliajn bonstatigajn aferojn por oficistoj kaj laboristoj. Por ilia sano la administracioj kaj sindikatoj de fabrikoj atentis pri starigo kaj disvolvado de la sanatoria afero. Sin refreŝigante en sanatorio, la oficistoj kaj laboristoj ricevas ne nur salajron, sed ankaŭ nutran subvencion. La kostoj por veturado, loĝado kaj kuracado estas pagataj de la ŝtato aŭ entreprenoj.

En Ĉinio la oficistoj, laboristoj kaj iliaj familianoj ĝuas fundamentan garantion en vivo, maljuneco, malsano kaj kripliĝo. Tiuj, kiuj perdis laborkapablon, ĝuas laboran asekuron. La mal-

sanaj oficistoj aŭ laboristoj ĝuas senpagan kuracon. Tiuj, kiuj laboris pli ol tri jarojn, ricevas 60% ĝis 100% de la tuta salajro dum ripozado pro malsano. Tiuj, kiuj vundiĝis aŭ kripliĝis pro laboro, ricevas kontentigan aranĝon de la ŝtato kaj entreprenoj. Kiam oficistoj kaj laboristoj mortis, iliaj familianoj ricevas monhelpon laŭ ŝtata difino. Dum akuŝa ripozo la akuŝintaj laboristinoj aŭ oficistinoj ricevas salajron kiel kutime. La parencoj vivtenataj rekte de oficistoj kaj laboristoj de entreprenoj ĝuas duonpagan kuracadon.

La ĉina registaro alte atentis pri la sekureco kaj sano de oficistoj kaj laboristoj en laborado. Dum la kvar jaroj, sole en karba industrio nia ŝtato jam elspezis 625 milionojn da juanoj por bridi gason kaj aliajn katastrofojn. En multaj provincoj kaj urboj fondiĝis sciencaj institutoj pri laborasekuro. En bazaj sindikatoj estas laborasekuraj komitatoj, kaj en grupoj sub sindikatoj estas laborasekuraj ekza-

Laboristino Wang Yanping, ŝiaj edzo kaj infano




menantoj, kiuj prenas sur sin la taskon superregi kaj ekzameni la sekurecon en produktado. Pere

de oficistaj kaj laboristaj kongresoj de entreprenoj, la sindikatoj superregas la administracion

en praktikado de efikaj rimedoj por sekura produktado.

Por altigi la sciencan, kulturen kaj teknikan nivelon de oficistoj kaj laboristoj, en nia lando oni starigis 820 postlaborajn universitatojn kaj 10 064 mezgradajn fakajn lernejojn, inter kiuj 66 universitatoj kaj pli ol 1 300 lernejoj kun 850 000 lernantoj estas funkciigataj de sindikatoj. Cetere, en Ĉinio 70% de la entreprenoj kaj administraj institucioj ekfunkciigis diversajn kursojn kaj tiel prezentis al oficistoj kaj laboristoj ŝancon sin klerigi kaj lerni sciencan kaj teknikon.

Diversnivelaĵaj sindikataj organizoj aktive entreprenas amasajn artajn kaj sportajn aktivadojn. En la tuta lando estas pli ol 21 500 laboristaj kulturaj palacoj kaj kluboj, kaj 130 000 bibliotekoj por oficistoj kaj laboristoj. Grandaj entreprenoj havas siajn proprajn kinejojn kaj teatrojn, multaj mezaj kaj malgrandaj entreprenoj havas siajn film-projekciajn taĉmentojn. En la tuta lando estas pli ol 20 000 laboristaj amatoraj ensembloj kun 350 000 aktivuloj. Viglas ankaŭ postlaboraj literaturaj kaj artaj verkadoj de laboristoj. En 1982 la Federacio de Sindikatoj de Ŝanhajo iniciis librolegadon inter oficistoj kaj laboristoj, kaj elis pli ol 200 000 homoj. En nia lando nun estas pli ol 15 000 sporthaloj por oficistoj kaj laboristoj, pli ol 250 000 sportaj teamoj, kaj pli ol 20 000 000 oficistoj kaj laboristoj ofte partoprenas en sportado. Krome, oni organizas maljunajn, debilajn kaj senilajn oficistojn kaj laboristojn al higienaj sportoj. Tio ludas grandan rolon por resanigi kaj fortigi ilin.



Pacientoj de la Laborista Sanatorio de Taihu-lago ludas ŝakon.

Laboristoj de la Wuhan-a Kaldronega Fabriko ekzercas sin en longdistanca kurado.



Vigliĝanta Esperanto-movado en Afriko

de NI DONGJANG

LA afrikaj popoloj longtempe suferis kruelan subpremadon kaj ekspluatadon de imperiismo en politiko kaj ekonomio kaj surtretadon de koloniistoj en kulturo. Nun la sendependiĝintaj afrikaj popoloj konstruas sian patrolandon kaj klopodas forigi la influon de koloniismo en kulturo. Ili tre deziras plifortigi la solidarecon de la afrikaj landoj kaj kontaktiĝi kun diversaj landoj de la mondo. En tiu situacio estas necese kaj eble disvolvi Esperanto-movadon en tiu kontinento, kaj ĝia disvolviĝo siavice antaŭenigos la E-movadon de la tuta mondo.

En Madagaskaro oriente de Afriko estis fondita la Esperantista Asocio de Madagaskaro (EAM) en februaro 1959 kaj ĝia dependa Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro en novembro 1961. Februaron 1968, stariĝis la Malgaŝa Esperanto-Instituto kaj estis leĝe agnoskita. Por diskonigi Esperanton esperantistoj de tiu lando aranĝis E-kurson ne nur en loka gazeto, sed ankaŭ en la Universitato-Radio en Tananarive. Nun la Ministerio pri Nacia Edukado permesis nedevigan instruadon de Esperanto en ĉiuj duagradaj publikaj kaj privataj lernejoj kondiĉe, ke la instruistoj nepre posedas kapablecon de instruado. En januaro 1983 pola pastro Jan Sadowski malfermis por 13 gejunuloj Esperanto-kurson en Marolambo. "Malgaŝa-Esperan-



Esperanto-kurso en la urbo Ondo, Niĝerio

ta Lingvogvidilo" kaj "Esperanta-Malgaŝa Vortareto" estis eldonitaj de UEA.

La Esperanto-Instituto de Zairo (antaŭe nomita Konga Esperanto-Instituto) estis fondita en 1963 kaj aliĝis al UEA en 1966. Nun ĝi havas 25 membrojn. En la unuaj jaroj post sia fondiĝo ĝi organizis E-kursojn en la ĉefurbo Kinŝaso kaj disvastigis en 1970 Esperanton en Bukawu. Poste ekfunkciigis E-kursojn ankaŭ por skoltoj, kaj ties instruistoj fondis Centron por la Disvastigo de Esperanto en Afriko. En la lastaj jaroj Esperanto-kursoj ekfunkciis en multaj urboj de Zairo. Krome, multaj lerninianoj lingvon per korespondakurso. Zairo estas lando, kies Esperanto-movado plej prosperas en Afriko.

En Eburio oni funkciigis Esperanto-kursojn unue en privata lernejo kaj en 1983 aperis studrondoj aŭ grupoj por lerni Espe-

ranton per korespondado. Kaj tridek studentoj en la Universitato de Abidjan komencis lerni la lingvon sub la aprobo de la rektoro de la universitato. Nun funkcias du apartaj elementaj E-kursoj kun ĉirkaŭ dudek lernantoj du horojn semajne.

En Niĝerio troviĝas aktivulo de Esperanto-movado s-ro Godwin Ijenekhuemen Oboh, kiu komencis en la fino de 1982 korespondan instruadon (laŭdire al dudek studentoj) kaj deklaris la fondiĝon de la Niĝeria Esperanto-Ligo. Ankaŭ membro de UEA s-ino Helga Farukuoye gvidas Esperanto-kurson en universitato de la urbo Ondo, en kiu partoprenis pli ol 100 studentoj, kaj fondis tie Esperanto-klubon.

En la insulo Reunio en la Hinda Oceano, en aŭgusto 1982, regiona ĵurnalisto intervjuis lokan esperantiston kaj aperigis duonpaĝan artikolon pri la lingvo. Kelkajn tagojn poste, la

Franca Radio-stacio FR3 invitis du esperantistojn prezenti programon en la Internacia Lingvo dum 50 minutoj. La 25-an de oktobro 1982 fondiĝis la Reunia Asocio por Disvastigo kaj Praktikado de Esperanto, kun ĉ. 20 membroj.

La Tanzania Esperanto-Asocio kun 20 membroj estis fondita en 1963. En septembro 1968 Radio Tanzania unufoje elsendis programon en Esperanto. Tie ĉ. 30 komencantoj fondis vilaĝan Esperantan grupon. Dum aprilo kaj majo 1983 centoj da informpetoj estis senditaj el Tanzanio al UEA.

Edward Symoens el Belgio faris en Rŭando ok prelegojn pri Esperanto por pli ol 900 personoj dum sia trimonata feriado. Li fondis Rŭandan Esperanto-Asocion kaj klopodas esperantistigi instruistojn.

Krome, en Angolo, Kamerunio, Alĝerio, Maroko, Tunizio, Togo, Kongo kaj aliaj, pli kaj pli multaj komencis lerni Esperanton, tamen ili ankoraŭ ne organiziĝis en klubon aŭ asocion.

En Eburio, Benino, Kamerunio, Zambio, Rŭando kaj Kenjo la fondo de landa asocio ne plu estas revo.

Laŭ la 1983a jarlibro de UEA, la landoj kun delegitoj kaj membroj de UEA estas Egiptio, Angolo, Kenjo, Niĝerio, Eburio, Senegalio, Alĝerio, Maroko, Bocvano kaj Namibio.

En la lastaj jaroj UEA kaj aliaj Esperanto-organizoj de iuj landoj donis pli kaj pli da atento al la afrika E-movado kaj intensigis sian laboron por subteni ĝian disvolviĝon. La Fondaĵo Azio-Afriko sub UEA elspezis dekmilojn da guldenoj en 1982 por eldonado, korespondado kaj

koresponda instruado en afrikaj landoj.

Post aperigo de svahilingvaj anoncoj pri Esperanto, en Kenja kaj Tanzania gazetoj, CO de UEA jam ricevis pli ol ducent informpetojn. Al ĉi tiuj afrikanoj estis senditaj broŝuroj kun la titolo "Kwa Kulinda Tamaduni za Afrika" (Por Defendo de Afrika Kulturo). La broŝuro, kiu argumentas por Esperanto per la temo de lingva imperiismo kaj koloniismo, trovis apartan atenton de la plejmulto de la informpetantoj. Multaj petis sendi al ili lernolibrojn de la Internacia Lingvo. Do, la Komisiono por Regiona Agado de UEA tuj sendis al ili libreton "Jifunze Lugha ya Kiesperanto" (Lernu la Lingvon Esperanto) kaj simplan dulingvan cirkuleron "Orient-afrika Bulteno".

En 1983, UEA eldonis Vortaron Esperanta-Svahilan de Jan Knappert. Ĝi estas la unua Esperanta vortaro por pure afrika lingvo kaj rigardata kiel mejloŝtono por la Esperanto-movado sur tiu kontinento, ĉar tie pli ol 30 milionoj da afrikanoj parolas la svahilan lingvon, kaj ĝi estas ankaŭ la ŝtata lingvo de Tanzanio kaj Kenjo.

TEJO starigis en 1968 la Afrikan Komisionon kun membroj i.a. en Alĝerio, Angolo, Sudano, Togo kaj Tunizio.


En la lastaj du jaroj la revuo *Esperanto* de UEA plimultigis raportojn pri la afrika Esperantomovado. UEA alvokis diverslandajn E-asociojn kaj individuojn subteni Afrikan laŭeble per homofortoj kaj financo, sendi Esperantaĵojn aŭ donacetojn, kaj kontaktiĝi kun tieaj E-klubo kaj personoj per korespondado.

Responde al tio la Internacia

Kultura Servo (IKS) en Zagrebo de Jugoslavio jam tri jarojn organizis E-kursojn por studentoj el disvolviĝantaj landoj kaj kreis la Fondaĵon "Esperanto en Afriko", kiu ĝis la fino de 1982 jam kolektis fonduson de 100 000 gld. Ekde 1983 oni ĉiujare elspezas interezon (10 000 gld.) por instrui Esperanton al 10-membra grupo de studentoj el unu afrika lando, kiuj studas en Eŭropo, pagi kostojn por iliaj vojaĝo kaj restado ĉe UEA aŭ TEJO-kongreso kaj eldoni lernolibron kiun oni donacas al la fondita aŭ fondota landa E-societo. IKS intencas organizi en 1987 konferencon de esperantistoj el 5 afrikaj landoj per la fonduso.

Ankaŭ la Japana Esperanto-Instituto donacis en 1982, pere de UEA, 9 librojn (Ĉu Vi Parolas Esperanton?) kaj sonbendojn al Angolo, Benino, Kamerunio, Kongo, Maroko, Maŭricio, Reunio kaj Niĝerio.

Ni ĉinaj esperantistoj kun amika sento tre ĝojas pri la nova situacio de la Esperanto-movado en Afriko kaj esperas, ke ĝi disvolviĝos pli rapide, pli vaste kaj pli forte.



D-ro Maier kaj lia edzino- amikoj de ĉinaj esperantistoj

LA 74-jara kamaradino Maier radiis de ĝojo, vestita per malhele verda robo, kaj kun blanka rubando sur la kapo. Ŝia edzo, 82-jara grizhara Karl Maier, en nigra eŭropa kostumo, kun blanka gazfloro sur la brusto, gaje akceptis siajn gastojn. La 6-a de septembro 1983 estis la tago plej feliĉa por ili. Tiutage ili ĝoje celebris sian oran jubileon de la geedziĝo. Antaŭ 50 jaroj ili geedziĝis pro la samaj aspiroj kaj komuna idealo. Nun ili feliĉe pasigas siajn lastajn jarojn.

Varmaj gratuloj venis al ili de


la parencoj kaj amikoj. Ĝuste tiam venis por ili la alia ĝojinda informo: La Ĉina Esperanto-Delegacio ĉeestis la 68-an UK kaj G. Maertens, prezidanto de UEA, donis al la ĉina delegacio la pokalon Fyne. Kiel malnovaj amikoj de la ĉina popolo kaj veteranaĵ esperantistoj, ili rememoris 22 jarojn, kiam ili pace vivis kun la ĉina popolo, kaj sian intiman rilaton kun Esperanto en la tuta vivo.

En 1925, en loka ĵurnalo de Merseburg en Halle-regiono estis publikigita anonco pri okaziĝo de balo por esperantistoj. En

la urbo Merseburg, ĥemi-industria centro, troviĝis multaj fervoraj esperantistoj. Juna Karl Maier partoprenis en la balo kun scivolemo. Tie li hazarde konatiĝis kun iu bela knabino kaj tuj enamiĝis al ŝi. Surbaze de la komunaj lernado kaj amuziĝado naskiĝis ilia amo. Tiam estis pli ol 20 junaj Esperanto-amantoj, kiuj legis la saman Esperantan lernolibron, ofte kunvenis kaj ekskursis kaj interparolis Esperante. Ĉio ĉi tio estis freŝa por ili kaj vekis intereson ĉe ili.

La komuna ŝato intimigis la knabinon kaj k-don Maier. Ilia

*K-do Maier en
sia biblioteketo*



amikeco eltenis la provon dum longa tempo kaj fine la juna paro fariĝis kunuloj.

En 1930, Karl Maier fariĝis membro de la Mondpaca Asocio. Li aktive partoprenis en la movado kontraŭ nazioj. En la sama jaro li en Halle lastafoje okazigis kontraŭnazian kunvenon kaj post nelonge, li kaj lia edzino forlasis Germanion. Kiam iu demandis k-don Maier, kial lin interesas Esperanto kaj kian utilon tiu lingvo havas en la praktiko, li respondis: "Oni lernas Esperanton por koni la mondon. Neniu povas ellerni ĉiujn lingvojn pro ilia komplekseco. Sed ellerninte Esperanton, ili povas kontaktiĝi kun alilandaj esperantistoj pere de ĝi."

La afero vere statas tiel. Kiam la geedzoj Maier migris eksterlande, ili konatiĝis kun multaj amikoj pere de Esperanto kaj ricevis ilian helpon en Ĉikago, Los-Anĝeleso, Honolulu, Nov-Jorko, Meksiko, Tokio kaj Jokohamo. En 1932 k-do Maier konatiĝis kun esperantisto Osaki Kazuo en Japanio, kiu skribis en sia notlibro: S-ro Maier "ne fumas, nek drinkas nek kredas je Dio. Indas por mi amikiĝi kun li." En tiu ĉi flaviĝinta notlibro ankoraŭ troviĝis ĵurnala eltondaĵo de Mainichi Shimbun (*Ĉiutaga Novaĵo*), eldonita en Oomuda en la 23-a de marto, 1932. En la ĵurnalo estis publikigita la novaĵo, ke Maier venis al Oomuda por prelegi kaj disvastigi Esperanton.

En la sama jaro la geedzoj Maier venis al Tianjin de Ĉinio kaj tie ekloĝis. Poste li fondis dentkuracejon kaj en kuracado li ĉiam strebadis por perfektigi sian kuracarton, kio estis multe laŭdata de malsanuloj. Zhou Li, lia ĉina samideano, menciis pri sia

kontakto kun k-do Maier en sia artikolo "Esperanto — interligilo de amikeco" aperigita en la gazeto EPĈ (n-ro 11/82). Zhou Li siatempe estis oficisto de iu banko, kontraŭ kiu troviĝis loĝejo de Maier. Pro la komuna ŝato de Esperanto, inter li kaj la geedzoj Maier stariĝis sincera amikeco. Post kiam la geedzoj revenis al sia patrolando en 1955, Zhou Li ĉiam tenis ilin en sia memoro, kaj ĝis nun ili ankoraŭ korespondas unu kun la alia. En la albumo de k-do Maier hodiaŭ ree videblas fotoj de multaj ĉinaj esperantistoj kaj iliaj subskriboj.

Post reveno al GDR, la geedzoj Maier daŭrigas sian klopodadon disvastigi Esperanton. Ili ĉiam havas rilaton kun la Ĉina Esperanto-Ligo, la revuo EPĈ kaj la ĉinaj malnovaj samideanoj. En la biblioteketo de k-do Maier troviĝas ĉinaj libroj kaj gazetoj, priskribantaj la politikon, ekonomion, historion, arton kaj naciajn morojn kaj kutimojn de Ĉinio. Li tre atente kolektas librojn koncernantajn Ĉinion eldonitajn en GDR. Li bindis la jarkolektojn de "Ĉinio en Konstruado" kaj "El Popola Ĉinio" jaron post jaro kaj gluis la detonditajn fotojn el la bildgazeto "Ĉinio" en albumoj laŭ malsamaj kategorioj. Vi trovos en lia malgranda legoĉambro pentraĵojn, kiujn pentris por li ĉinaj pentristoj Li Keran kaj Guan Liang dum sia vizitado en GDR, kaj memoraĵojn donacitajn de ĉinaj studentoj. Ĉio ĉi estas simbolo de la amikeco inter gek-doj Maier kaj la ĉina popolo.



NASKIĜO DE LA FUJIAN-A ESP-ASOCIO

La nomita asocio naskiĝis la 28-an de decembro 1983 en Fuzhou, la ĉefurbo de Fujian-provinco. La inaŭguron ĉeestis pli ol 200 personoj, inter kiuj estis Xu Huai-zhong, Zhu Zhanhua kaj aliaj respondeculoj de la propaganda departemento de la provinca komitato de la Kompartio de Ĉinio, la kultura buroo kaj la turisma buroo kaj reprezentantoj de aliaj lokoj de la provinco. Xu unue faris inaŭguran paroladon. Li diris, ke Esperanto estis enkondukita en la provincon je la komenco de la nuna jarcento kaj ke la unua libro eldonita enlande estis tradukita kaj kompilita de sinjoro Lin Zhenhan, Ningde-ano de la provinco. Fujian estas fame konata kiel hejmloko de la elmigrantaj ĉinoj kaj speciala ekonomia regiono sub praktiko de malferma politiko por eksterlando. Tial Esperanto devas fariĝi ponto de la kultura interŝanĝo inter la provinco kaj aliaj landoj. Li diris ankaŭ ke Fujian alfrontas Taivan trans maro, kaj la esperantistoj de la du provincoj devas unuiĝi, kune diskuti pri la akademias problemoj pri Esperanto kaj fari kontribuojn al la unuiĝo de la patrolando kaj la paca afero de la homaro. La kunveno elektis Zhu Zhanhua kiel prezidanton de la asocio. Post la inaŭgura kunveno okazis dutaga kunsido pri la laboro de la asocio.

FONDIĜO DE DU FAKAJ ESP-ASOCIOJ

La 5-an de januaro ĉi-jare fondiĝis la Fervoja Esperantista Asocio de la Huhhot-a Fervoja Administracio en Huhhot, la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, sub la aŭs-



La inaŭguro de la Fujian-a Esperanto-Asocio



La Unua Kongreso de la Lanzhou-a Esp-Asocio

picioj de la Esp-Asocio de la regiono kaj la gvidantoj de la administracio. Ĝi estas la unua Esp-organizaĵo de la ĉinaj fervojistoj. En la lasta jaro la novaj kaj veteranaĵoj esperantistoj de la fervoja administracio de Huhhot aktive disvastigis nian lingvon, eldonis la mimeografitan revuon "Amikoj de Esperanto", funkciigis Esp-kurson por fervojaj laboristoj kaj oficistoj kaj elkulturis nombrojn da esperantistoj, kio kreis necesajn kondiĉojn por la fondiĝo de la asocio. La inaŭguro ĉeestis 150 personoj, kiuj elektis Li Changyuan, estron de la Huhhot-a Fervoja Administracio, kiel honoran prezidanton, kaj Li Shen, Ye Jian kaj Chu Qingchang

kiel prezidanton kaj vicprezidantojn de la asocio.

La 9-an de decembro 1983, la prepara grupo de la Trafika Esp-Asocio de la Guangxi-a Ĝuangnacieca Aŭtonoma Regiono fondiĝis en ĝia ĉefurbo Nanning. Ĝi estas destinita por esplori aplikojn de Esperanto en la scienca kaj teknika kampo.

UNUA KONGRESO DE LA LANZHOU-A ESP-ASOCIO

La nomita kongreso, nome la unua jarkunveno de la Lanzhou-a Esp-Asocio, okazis en la 18-a kaj 19-a de decembro de la pasinta jaro en Lanzhou, la ĉefurbo de Gansu-provinco. La kongresanoj

aŭskultis la raporton de la konsilantaro de la asocio, interŝanĝis la fruktojn de akademiaj studoj, faris konkursojn pri kantado, deklamado, konversacio kaj tradukado kaj premiis la elstarantajn. Ĝin ĉeestis invitite Ge Shenghua kaj Xue Fangyu, la prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Federacio de la Socisciencaj Asocioj de la urbo, kaj esperantistoj de la provincoj Henan, Qinghai kaj Gansu.

INTERNACIA SEMINARIO EN ESPERANTO

En Niendorf apud la Balta Maro en FR Germanio 175 junuloj kaj junaj plenkreskuloj el 19 landoj kunvenis inter la 27-a de dec. 1983

kaj la 5-a de jan. 1984 por trakti la temon "La libera homo kaj 1984" en la internacia lingvo Esperanto. La diskuto disvolviĝis interalie ĉirkaŭ la libro "1984", kiu tuŝis la eblecon kontroli individuon per mikroelektroniko.


BELETRISTIKO FERVOJA EN IFEF-KONGRESO 1985

Denove IFEF alvokas ĉiujn fervojistojn, amatorojn, amikojn de fervojo kaj kromprofesiajn beletristojn kunlabori en la nova konkurso "Bonvojaĝu!" Verku poezie kaj proze, fantazie kaj realisme el la tuta fervoja medio. Ĉiu verko, kiu respektas la teknikan regularon kaj agnoskitajn regulojn de poetiko, estas bonvena.

La konkursaĵo devos atingi plej malfrue ĝis la 30-a de septembro 1984 la sekretariinon de la juĝkomisiono: Elfriede Kruse, Wiener Strasse 121, D 6000 Frankfurt/M 70, FR Germanio.

ANTAŬKONGRESO DE SAT

De la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1984 okazos en PAU (Francio) la antaŭkongreso de la Sennacieca Asocio Tutmonda. En la programo estas prelegoj, ekskursoj, vizitoj kaj turismo.



Veterana franca esperantisto René LLECH-WALTER

FRANCA PIONIRO RENÉ LLECH-WALTER

Eks-estrarano kaj komitatano de UEA, prezidanto de la Franca Unuiĝo, de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono" kaj de la Kultura Esperantista Centro de la Orientaj Pireneoj, malnova abonanto de El Popola Ĉinio René LLECH-WALTER, kiu naskiĝis en Perpignan (Francio) la 30-an de marto 1906 kaj agas por Esperanto jam de 1921, estis premiita de la ministro de la Franca Edukado kiel "Komandoro de la Akademijaj Palmoj" — la plej alta distin-

go en tiu ordeno — 1982. Dum 1983 la komitatanoj de la grava literatura okcitana kaj kataluna societo "FELIBRIGE" kreita de Frédéric Mistral (35.000 membroj) elektis lin "Majoral del Felibrige". Jen estas lia foto:

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO DE TANEF 1984

Turista Asocio la Naturamikoj Esperanto Fako (TANEF) okazigos de la 19-a ĝis la 26-a de majo internacian feriosemajnon en la Naturamika Domo "Pension Gnaid" en la klimata kuraĉloko Dorf Tirol, Italio.

ESP-INSTRUADO EN LERNEJO EN VILLINGEN-SCHWENNINGEN

Ekde septembro 1983, 15 gelerntoj de supera klaso (Berufsschule), strebantaj al allaso al teknika altlernejo (Fachhochschule), lernas Esperanton en libervola studrondo (Arbeitsgemeinschaft). La du horoj de Esperanto-lernado po semajno estas en la kadro de la normala horaro. La juĝnotoj pri Esperanto estos enskribataj en la oficialaj notatestoj. Tio estas granda sukceso por iom-post-ioma enkonduko de Esperanto en la lernejojn en FR Germanio.


La nova kurso funkciigata de la Esperanto-klubo "Fratego kaj Unueco" en Split, Jugoslavio




RIĈA RIKOLTO DE GRENOJ KAJ KOTONO DE ĈINIO EN 1983




Grena sunumejo de la 14-a regimento de la unua divizio de la Xinjiang-a Produkta kaj Konstrua Korpuso



Agronomo Li Donghui (la dekstra) de la Hebei-provinca Agronomia kaj Forstuma Akademio en observado de milia kreskado



Kampanano Ren Jianfa de Yukou-komunumo de Datong-gubernio, Shanxi-provinco vendis al la ŝtato 26 500 kg. da greno. La foto montras lin en sunumado de maizo.



La Wucheng-guberna koton-aĉetejo de Shandong-provinco


SPECIALIGITAJ KAMPARANAJ FAMILIOJ



Cao Yinxiang en kovadejo

Koko-bredejo de Cao Yinxiang

Fotoj de ZHU YUNFENG



Bonspeciaj kokidoj

Bovino Yan Chengzhu

Fotoj de RAO BOKUN

Yan Chengzhu estas kamparano de Jinjiang-gubernio de Fujian-provinco. Li bredas 11 bovinojn, kiuj ĉiutage produktas ĉ. 200 kg. da lakto. Li vendas parton de la lakto al lakto-ladiga fabriko kaj la restan parton en foiro. Dank' al tio li ĉiujare enspezas 14 000 juanojn. Per parto de sia enspezo li konstruis etaĝdomon, bovinejon kaj staplon kun areo de 550 kvadrataj metroj.




Bovinoj bredataj de Yan Chengzhu




Zorgado pri bovinoj

Cao Yinxiang, kamparano de Xiuning-gubernio, Anhui-provinco, pene lernis koko-bredan teknikon kaj fondis koko-bredejon en sia hejmo. Li bredas 27 000 kokojn, el kiuj plejparton li vendas al la merkato kaj parton liveras al aliaj koko-bredaj kamparanoj kiel bonspeciajn kokojn. Per tio li havas kompare altan enspezon.

La koko-bredejo projektita de Cao Yinxiang. Antaŭ ĝi troviĝas lageto por trinki kokojn per la akvo kaj bredi fiŝojn per koko-fekajo.




Lia filo antaŭ portado de lakto al konsumantoj



Familioj Farantaj Agrikulturilojn

Kelkaj kamparanoj lertaj en farado de lignaj agrikulturiloj, Jiangcun-komunumo, Dingxiang-gubernio de Shanxi-provinco fondis agrikulturilan metiejon. Ili faras bonkvalitajn lignajn agrikulturilojn por liveri al la loka agrikultura produktado kaj pliigi sian enspezon.



Duonpretigitaj agrikulturiloj



Farado de agrikulturiloj



Transportado de agrikulturiloj al foiro

Eksterordinara donaco

de LI YU

JULIE 1929 iu viro nomata Yang portempe loĝis en vilaĝo de Fujian-provinco por sin resanigi. Oni ameme nomis lin direktoro Yang.

Iun fruan matenon, kiam la najbara avino Lai ellitiĝis por prepari matenmanĝon, ŝi rimarkis, ke ankoraŭ brilas malforta lamplumo en la bambua kabano de direktoro Yang. Kortuŝite de tio, ŝi volis donaci ion nutran al direktoro Yang, kiu tage kaj nokte laboris por la malriĉuloj eĉ en malsano. Ŝi do portis korbon da ovojn al la kabano kaj diris sian intencon. "Koran dankon al vi pro via bonkoreco, avinjo," diris Yang. "Ilin kolekti estas por vi ne facile, bonvolu reporti la ovojn."

Malgraŭ ŝia petado, li persistis en sia opinio, kaj ŝi povis fari nenion alian ol porti la ovojn hejmen. Ĉe la pordo de la hejmo ŝi renkontis sian nepon Niuzi. Ŝi do sendis lin tien.

Niuzi transprenis la korbon kaj gaje sin turnis al la kabano. Li alkröĉiĝis al la gardisto de direktoro Yang, por ke Yang akceptu la ovojn. Ĝuste en tiu momento eliris la direktoro. Niuzi tuj subtiris la manon de la gardisto kaj signis al li per la buŝo, por ke tiu persuadu lin al akcepto de la ovojn.

La direktoro ridete diris al la gardisto: "Niuzi jam estas tiel embarasita, nu, ni do akceptu la donacon."

Niuzi ĝojiĝis kaj, lasinte la korbon, fluge kuris hejmen. Informiĝinte pri tio, ankaŭ la avino

ĝojis kaj ripete laŭdis sian nepon pro lia lerteco.

Pasis pli ol dudek tagoj, kaj la direktoro Yang estis forlasonta la vilaĝon. Kunportante korbon kovritan per tuko, la gardisto venis al la hejmo de Niuzi kaj diris: "Direktoro Yang sendis min al vi kun donaco. Ĉu vi povus diveni, kio ĝi estas?" Niuzi palpebrumadis kaj vane rompis al si la kapon por diveni.

Senpacience li skuis la manon de la gardisto kaj diris: "Montru ĝin al mi, mi petas."

La gardisto forprenis la tukon de sur la korbo, kaj en la sama momento ekkriis Niuzi kaj lia avino: "Ho, kokidoj!" Jen, kiaj amin-

daj kokidoj vikle saltetantaj en la korbo!

La gardisto klarigis: "La ovojn, kiujn vi donacis al direktoro Yang, li ne manĝis, sed kovigis per kokino prunteprenita en la vilaĝo. Li petis min transdoni la kokidojn al vi, dirante, ke, kiam ili plenkreskos kaj demetos ovojn, vi povos interŝanĝi la ovojn kontraŭ iom da ĉiutagaj bezonaĵoj en la foiro."

Niuzi donis rigardon al la kokidoj kaj poste al la avino, kiu, kun larmoj en la okuloj, ne povis eldiri eĉ unu vorton dum longaj minutoj.

Poste, ili informiĝis, ke la "direktoro Yang" estis prezidanto Mao Zedong.



Praktika Esperanta Frazeologio

KIEL DIRI. . . ? kompilita de Lentaigne. Dua eldono korektita kaj kompletigita. Eldonis: "Laŭte", F 47340 Laroque Timbaut Francio. Formato: 14 × 21 cm. 148 p. Prezo (inkluzive de sendokosto): 24 f. aŭ 3 dolaroj.

En malpli ol tri jaroj elĉerpiĝis la unua eldono (2000 ekzempleroj) de tiu kompilaĵo, kio montras pli bone ol ŝvelaj paroloj, la oportunecon kaj la altan kvaliton de la laboro de k-do Lentaigne.

Temas efektive pri kolekto de tutpretaj vort-aranĝoj, kiujn la aŭtoro diligente ĉerpis ĉefe el la "Domfabriko" de Kalocsay-Csiszar kaj el la Plena Ilustrita Vortaro: tiu procedo certigas la nekontesteban valoron de la materialo.

La 5000 tiel rikoltitaj esprimoj estas klasitaj sub 67 temoj, elektitaj el inter la plej ofte renkontataj. Sub ĉiu temvorto viciĝas unue la plej kutimaj vortasocioj, aŭ kun epitetoj (ekz-e: "LINGVO nacia, hereda, patriana, vivanta, mortinta, artefarita ktp."); poste la sinonimoj aŭ proksimsencaj vortoj (ekz-e: "scipovi lingvon libre, ne libere"; "dediĉi multajn jarojn al la lernado de lingvoj" ktp.). Sube de ĉiu artikolo spaceto restas blanka, por ke la uzanto povu enskribi kelkajn notojn.

La apero de nova eldono, pli plaĉ-aspekta, prezentas bonan bazon por la studemaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne konas

tiun utilan komplementon de la nacilingvaj vortaroj, aĉeti ĝin kaj precipe ĝin atente kaj multfoje foliumi: nenio povus pli efike helpi ilin akiri fluan parolon kaj internacian esprimilaron. Ĉar, por ĝui facilan uzadon de lingvo, gravas, ke la memoro entenu ne nur kvanton da unuopaj vortoj kun ties ĝusta senco, sed ankaŭ stokon da stereotipaj frazaĵoj, aŭtomate disponeblaj kaj ĝenerale kompreneblaj.

Recenzis **G. WARINGHIEN**

La fontoj de Esperanto

LA FONTOJ DE ESPERANTO de D. B. Gregor. Dua eldono. Eldonita de KARDO, Glasgow. Formato: 20.5 × 14.5 cm. 34 paĝoj. Prezo £ 1.5.

Tiu ĉi broŝuro kun modesta aspekto unue aperinta antaŭ pli ol dudek jaroj traktas pri la fontoj de la fonetiko, morfologio, vortaro kaj sintakso de Esperanto. La celo de la aŭtoro estas "enmanigi al ĉiuj pri tio interesiĝantoj esperantistoj la internajn, por ne diri intimajn, detalojn pri la naskiĝo kaj funkciado de ilia dua lingvo". Li opinias, ke tio estas necesa por esti "kapabla argumente kontraŭstari iun ajn lingviston, ĝuste taksita la diversajn formojn de la Esperanta stilo, efektive sonigi la tutan klavaron de tiel grandioza orĝeno". Post tralego de la broŝuro mi konstatis, ke ĝi estas pli riĉa ol mi atendis. Mi kredas, ke tiuj, kiuj deziras seriozan studon kaj opiniojn pri la temo, certe dankos la laboron de sinjoro D. B. Gregor kaj jesos la utilon de lia verko. La presaĵo estas klara kaj plaĉa kaj la malmultaj preseraroj tute ne ĝenas la legadon.

Recenzis **LAŬLUM**

Nove ricevitaj libroj

LA FERMITA URBO originala sciencfantastika romano de István Nemere, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 128 p. Prezo: 13.80 gld.

LA BLINDA RIDO originala romano de István Nemere, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 120 p. Prezo: 15 gld.

KIBERNETIKO DE LA HOMA LINGVO (kaj aliaj internacilingvaj aktoj de la IX-a Internacia Kongreso de Kibernetiko) kompilita de d-ro Helmar Frank k. a., eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio kaj la Instituto pri Kibernetiko. Formato: 14 × 20 cm. 192 p. Prezo: 15 gld.

LA FOSTOKIRKOJ DE NORVEGUJO de Roar Hauglid (estro de naciaj antikvaĵoj), eldonita de la Reĝa Norvega Ministerio pri Eksteraj Aferoj. Formato: 21 × 29.5 cm. 8 p. Senpage akirebla kontraŭ peto al la Norvega Esperantista Ligo (adr.: Olaf Schousv. 18, Oslo 5, Norvegujo).

KIAL LA INFANOJ LERNU ESPERANTON? de Erika Linz, eldonita de ESPERANTO VERLAG PALATINA GMBH. Formato: 15 × 20.5 cm. 16 p. Prezo ne montrita.

GÓRA SW. ANNY de Wieslaw Lesiuk k Michal Lis, tradukita el la pola Kazimierz Strzelecki, eldonita de Vojevodio Centro de Scienca, Teknika kaj Ekonomia Informado en Opole. Mimeografia broŝuro en formato: 10 × 14 cm. 18 p. Prezo: 2 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro.

ZHANG QINGZHEN:


Pontoj naskiĝis en ŝiaj manoj

SUPER la malsupra Flava Rivero proksime al Jinan, la ĉefurbo de Shandong-provinco, oni finkonstruis stajan pendoponton el antaŭpremita armita betono kun spano plej larĝa en Azio. Ĝi kvazaŭ bela ĉielarko kuŝas super la rivero. La nomo de la projektintino, Wan Shanshan, diskoniĝis kun la naskiĝo de la ponto.

LA SORTO EKFAVORAS ŜIN

Mi konatiĝis kun Wan dum la Kvina Tutlanda Virina Kongreso okazigita en oktobro de 1983. Ŝi, altklasa inĝenierino, estis afabla kaj modesta. Ŝi parolis en milda suda dialekto kaj aŭdigis de tempo al tempo iom raŭkan ridon. Post kelk-hora interparolado mi jam ne sentis ŝin fremda, sed ekhavis korinklinon kaj respekton por ŝi.

Ŝi diplomitiĝis el la Tianjin-a Universitato en 1961, kie ŝi studis pri havenkonstruado. Sed pro ŝtata bezono ŝi estis postenigita por okupiĝi pri pontoprojektado en la Trafika Administracio de Shandong-provinco. Ŝi komprenis, ke tio kaŭzos multajn malfacilojn al ŝia laboro, ŝi tamen akceptis la taskon kun plezuro. Ŝi tuj komencis lerni fakajn sciojn kaj aktive partoprenis en mezurado, konstruado, struktura eksperimentado k.a. En la praktikado ŝi iom post iom posedis sciojn pri pontoprojektado. Ekde 1962 ŝi jam povis projekti grandan ponton memstare. En 1972 ŝi bonkvalite plenumis projekton de hiperbola ark-ponto dum unu monato. Ĝis nun ŝi jam partoprenis en projektado de 25 grandaj pontoj. Ŝiaj malnovaj kolegoj diris, ke la sorto ekfavoras ŝin.



La Staja Pendponto super la Flava Rivero ĉe Jinan

NOVAJ STELOJ

Wan Shanshan diris: “Mi vere estas feliĉa, ke, nelonge post kiam mi diplomitiĝis el la altlernejo, mia gvidanto donis al mi ŝancon projekti memstare, por lertigi min. Tial mi povis projekti poste grandan komplikan ponton.”

En 1975 ŝi kaj alia teknikisto prenis sur sin projektadon de la unua ĉina staja pendoponto kun la ĉefa spano de 104 metroj. Tia novtipa ponto kun larĝa spano kaj akomodigemo estas bela kaj ekonomia. Iuj opiniis, ke ili estas tro junaj por plenumi la taskon. Sed ili ricevis plenan konfidon kaj subtenon de la gvidantoj kaj plenenergie sin ĵetis en la laboron. Dum la tri jaroj de la projektado ĝis la finkonstruado de la ponto Wan Shanshan laboris en la konstruejo du jarojn. La konstruado de la ponto iris tre glate kaj la projekto estis premiita kiel eminenta projekto de la 70-aj jaroj de Shandong-provinco.

La staja pendoponto super la Flava Rivero ĉe Jinan ekkonstruiĝis en 1977. Wan Shanshan estis

ĝia ĉefa projektinto. La ponto estas komplika en strukturo kaj avangarda en tekniko. En la projektado kaj konstruado oni devis uzi komputeron, sed antaŭe Wan kaj ŝiaj kolegoj ne studis ĝin. Ili modeste konsultis fakulojn kaj fosis en koncernaj materialoj, kaj baldaŭ posedis sciojn pri komputero.

Multajn renovigojn ili faris dum la ĝenerala projektado kaj konstruado. La ponto havas 46 parojn da kabloj, la plej longa kablo longas je 110 metroj kaj pezas je 3 tunoj kaj ĉiu pontpilono havas altecon de 70 metroj. Laŭ materialo, por fiksi kablون sur pontpilono oni devis fari plurfojan tiradon, kaj la laboro estis tre danĝera. Por sekurigi kaj rapidigi la konstruadon, ili trovis, post provado, rimedon fiksi kablون per unufoja tirado.

Kiam Wan kaj ŝia kolego plenumis la projekton de la ponto, ili estis nur pli ol 30-jaraj. Oni nomis ilin "novaj steloj" en pontokonstruado de Ĉinio.

Post kvar jaroj oni finkonstruis la stajan pendoponton kun longeco de 2 023 metroj, larĝeco de 19.5 metroj kaj ĉefspano de 220 metroj. Ĉiuj ĝiaj ekonomiaj kaj teknikaj normoj proksimiĝis al la avangarda nivelo de eksterlandaj samtipaj pontoj. La ponto montris, ke la ĉina pontokonstruado eniris novan periodon. Ĝi gajnis ŝtatan premion de eminenta projekto de la 70-aj jaroj

kaj ŝtatan premion de bonkvalita konstruo de 1982. Pro sia kontribuo en la ĉina pontokonstruado Wan Shanshan promociiĝis altklasa inĝeniero.

SUBTENO KAJ FORTO

La edzo de Wan Shanshan estas konstrua inĝeniero. Por krei laborkondiĉojn por la edzino, li dividis kun ŝi dommastrumadon. Ŝi diris: "Ĉu en malfacilaj tagoj, ĉu en feliĉa tempo por ĝui sukcesojn, mi ne forgesis mian edzon, kiu ĉiam donis al mi helpon, subtenon kaj forton."

En 1976, kiam Wan partoprenis en la konstruado de ponto super Dagu-rivero ĉe Qingdao, ŝi jam havis du infanojn. Pro laboro ŝi kunportis sian 8-jaran filinon al la konstruejo, dum ŝia filo restis hejme kun sia patro. Ŝi kaj ŝia filino loĝis en laborista barako. La filino devis lerni en vilaĝa elementa lernejo proksime de la konstruejo. Ŝi ne kutimiĝis al la tieaj malfacilaj vivkondiĉoj. Foje ŝi skribis sur pordoklapo jenajn vortojn: "Mi volas reveni hejmen." Leginte la patrino ne povis sin deteni de larmoj. Ŝi ne povis forlasi la konstruejon, ĉar tie estis ŝia posteno.

En 1980, kiam iris la intensa konstruado, Wan Shanshan malsaniĝis. Ŝi enhospitaliĝis kaj ricevis operacion. Post unu monato, kiam ŝi iom resaniĝis, ŝi revenis al sia laboro.

Ĝuste tiel tutkore kaj senlace ŝi klopodas por atingi sian celon.



Wan Shanshan (dekstre) faras mezuradon sur konstruejo.

SUR LA ĜUSTA VOJO

de **WANG LI**

Itage de 1983 la plej granda ĵurnalo de Ĉinio aperigis foton, en kiu knabino kun plaĉa vizaĝo estas absorbite riparanta elektran aparaton. Ŝi estas Wang Li en la urbo Jinzhou de la Nordoriento de Ĉinio. Ŝi mem solvis por si la problemon de profesio. Ŝi renkontis tiajn kaj tiajn malfacilojn, sed ŝi persiste iras sian vojon de ŝi mem elektitan.

LA RED.

Antaŭe eĉ en la sonĝo mi ne atendis, ke mi elektis en mia vivo vojon mem solvi la problemon de profesio.

En mezlernejo mi tre ŝatis literaturon kaj matematikon, kaj bone lernis ankaŭ aliajn kursojn. Antaŭ 4 jaroj mi abiturientiĝis kaj pretis partopreni en la enira ekzameno de supera lernejo, kun la espero fariĝi literaturisto aŭ sciencisto. Por sukcese trapasi la ekzamenon, mi ellitiĝis ĉiutage en la kvara, kaj ofte studis ĝis profunda nokto. Sed fine mi malsukcesis en la ekzameno kun kelkaj poentoj sub la enira normo. Mi tiel ĉargreniĝis, kvazaŭ la koro plorus. Mi estis juna kaj povis refoje provi en la ekzameno, sed kion fari, se mi denove malsukcesos? Ĉu mi estu vivtenata de miaj gepatroj?

Iun vesperon, en televida programo oni raportis pri kelkaj junuloj, kiuj fondis malgrandan manĝejon. Mi estis inspirita: "De multaj jaroj mi ŝatas radio-teknikon kaj lernis de la patro elektronikan teknikon. Ĉu mi fondu per propra mono riparejon de elektraj aparatoj?" Mi iris al

la Urba Administracio de Industrio kaj Komercio, eldiris mian deziron. Mi akiris ilian kuraĝigon kaj subtenon. Post intensa preparado ekfunkciis mia riparejo en la plej movoplana strato de la urbo.

Oni tre bezonas mian riparejon. Ĝin vizitadas multaj klientoj. La malvasta riparejo de malpli ol 6 kvadrataj metroj ofte estas plenplena de klientoj. Iuj petis min ripari por ili transistojrajn poŝ-radiaparatojn, kiujn aliaj riparejoj ne akceptis. Mi atente kontrolis la difektitajn aparatojn kaj ŝanĝis al ili novajn pecojn. Dank' al tio, reviviĝis la silentaj aparatoj, kaj la amasoj tre fidis min. Tio ja estas la plej granda kuraĝigo por mi, kiu ĵus suriris la vivovojon.

Mi servis kun granda fervoro, sed kelkaj ĵetis bastonon al mi en la radon. Foje mi riparis radiaparaton por iu junulo, sed tiu stratulaĉo rifuzis pagi kaj ĉiknadis min senĉese, ĝis mia patro venis kaj kvietigis la aferon. Aliffoje junulo venis al mi kun grave difektita radiaparato, al kiu mankis kaj malantaŭa kov-

rilo kaj multaj pecoj. Mi zorgeme ekzamenis ĝin kaj klarigis al li, ke ĝi ne indas riparon. Li tuj superŝutis min per ironio kaj moko, kaj cetere li malordigis objektojn en mia laborejo. Mi koleriĝis preskaŭ ĝis larmoj. Ĝuste tiam alvenis maljunulo. Li kaptis la junulon je la ŝultro kaj diris al li: "Vi kondukas mallaŭdinde. Mi konas vin, vi laboras en alia riparejo." La junulo foriris en honto. La maljunulo konsolis min kun ridetoj: "Ankaŭ li funkciigas riparejon, sed via ĉambro estas plena de klientoj, dum lian riparejon malmultaj vizitas, kaj pro tio li intencas forpeli vin."

Post nelonge min ĝenis alia malfacilo. La mastro de la domo volis mem uzi ĝin kaj urĝis min transloĝiĝi. Antaŭ la sinsekvaj komplikaĵoj mi ekŝanceliĝis: Ĉu estas vere malglata la vojo elektita de mi mem? Tiam la oficejo de mia patro komencis varbi novajn laboristojn inter la gefiloj de siaj oficistoj, kaj cetere ankaŭ la termoelektrajo faris la samon. Miaj intimaj kunlernintoj atentigis, ke mi neniel preterlasu la

ŝancon. Ankaŭ mi preferis esti laboristino de ŝtata entrepreno. Ĝuste kiam mi hezitis, gvidantoj de la urbo kaj distrikto venis al mia riparejo por kuraĝigi min daŭrigi la riparadon. Post nelonge konstruaj branĉoj konstruis por mi laborejon de dekelkaj kvadrataj metroj. Sekretario de la urba partia komitato iris al mi por enketi pri mia stato. Mi ne havas lertan langon kaj nur balancis la kapon por montri, ke mi jam solvis la malfacilon. Sed ek-bolis mia koro: Kiel ordinara junulino, mi faris nur tre malgrandan servon al la socio, sed min rekompencis la prizorgo de gvidantoj kaj subteno de la popolo. Mi sentis la varman pulson de la socio. De tiam mi pli energie eklernis teknikon, dank' al kio evidente rafiniĝis mia tekniko de riparado.

“Servi plej fervore, pagigi racie”, jen la de mi mem difinita kriterio por mia servo. En la riparejo mi pendigis sur la muro paperon, sur kiu estas anoncitaj ses reguloj: 1. informi klienton pri la grado de difektiĝo de la aparato; 2. sciigi klienton pri la pago por riparado; 3. peti klienton provi la riparitaĵon ĉeloke; 4. senpage reripari negravajn difektojn; 5. doni apartan favoron al la klientoj venintaj de malproksime; 6. ripari en la hejmo de kliento, se tio estas necesa.

Mi rigore praktikas la regulojn. Estis vespero de Novjaro. Ekstere flirtis grandaj neĝflokoj. Ĝuste kiam mi pretis iri hejmen, el montara garnizonejo venis al la riparejo du soldatoj kun granda televidilo. Vidinte, ke mi estas tiel juna, ili montris sin dubemaj. Mi pensis, ke la soldatoj garnizonas tre malproksime for de sia hejmo, kaj nur la televidilo povas akompani ilin en la festo, kaj tial mi devas plej bal-



Wang Li esploras pri cirkvito kaj funkcio de magnetofono

daŭ rebonigi por ili la televidilon eĉ sen manĝo. Mi ĝentile promesis ripari ĝin. Mi tuj komencis la ekzamenon kaj riparadon. Tute malheliĝis, kaj mia patro venis urĝi min iri hejmen. Sed kiam li trovis, ke mi ŝvite laboras, li tuj helpis min. Post du horoj mi sukcesis rebonigi la televidilon. Ili devis pagi almenaŭ 40 juanojn (2 juanoj egalas ĉ. 1 usonan dolaron) nur por la konsumitaj materialoj. Sed la soldatoj ne havis tiun monsumon. Tiam mi decidis pagigi al ili duonon de la sumo. Cetere, mi kaj mia patro helpis ilin porti per mia biciklo la televidilon al la fervoja stacio. Kiam ni atingis la hejmon, jam batis la naŭa.

Iun someron, en nia urbo grave minacis epidemia encefalito B-tipa. La muk-elsuĉiloj de la Hospitalo de Infekta Malsano ne sufiĉis por la bezono. La hospitalo sendis al mi difektitajn muk-elsuĉilojn por ripari. Mi senhezite akceptis la peton kaj laboris tage kaj nokte. De tiam la hospitalo ofte petas min ripari ĝiajn aparatojn. Poste helpate de mia

patro, mi riparis por aliaj unuoj urĝe bezonatajn medicinajn kaj elektrajn ekipaĵojn.

Kiam oni bezonis ripari grandajn kaj pezajn elektrajn aparatojn, mi senprokraste vizitis la klientojn por ripari aparatojn en iliaj hejmoj, ekzemple, penda elektra ventumilo, fridujo, lavmaŝino k.a. En la pasintaj du jaroj mi centfoje iris al klientoj por ripari iliajn elektrajn aparatojn.

Mi pli kaj pli profunde komprenis, ke por gajni la fidon de la amasoj krom fervoreco mi bezonas ankaŭ bonan teknikon. Por atingi tiun celon, mi neniam malstreĉis min en studo. Mi ofte iris al biblioteko por konsulti librojn. La studo ofte daŭris ĝis noktomezo. Nun mi jam povas lerte ripari diversajn televidilojn, magnetofonojn, lavmaŝinojn, elektrajn fridujojn, elektronikajn komputerojn, medicinajn aparatojn k.a. En la pasintaj du jaroj mi riparis pli ol 3 700 aparatojn kaj la profito atingis dek mil juanojn. Mia malgranda riparejo gajnis konfidon ĉe la klientoj.

Mi havas tri plijunajn fratinojn. Influante de mi, ankaŭ mia unua fratino suriris la vojon mem solvi la problemon de profesio. Mi instruis al ŝi teknikon, donis al ŝi mil juanojn por konstrui la riparejon. Nia lando estas tre vasta kaj havas grandan loĝantaron, kaj la popola registaro ne povas solvi por ĉiuj la problemon de profesio. En la lastaj jaroj, sub la instigo kaj subteno de la popola registaro, en nia distrikto multaj senlaboraj junuloj fondis vendejojn kaj riparejojn. Helpate de la supera organizaĵo de la Komunista Junulara Ligo, ni starigis filion de la membroj de la junulara ligo, kiuj mem solvis la problemon de profesio. Mi estis elektita kiel ĝia vicsekretario. Krom bone servi en la butikoj, ni junuloj ofte partoprenas en sociaj aktivadoj. Ni starigis standojn sur stratoj por doni senpagan servon. Tiamaniere mi riparigis pli ol 150 elektraĵojn.

Mi faris nur ion farendan, sed la popolo multe honoris min. Mi estis elektita kiel urba avangarda persono kaj provinca avangarda laboristino, kaj ĉeestis la Kvinan Tutlandan Virinan Kongreson okazintan en 1985.



VIDINDAJ LOKOJ

LA FENIKSA MONTO

de QU WEIBO

LA Feniksa Monto — unu el la famaj pitoreskejoj en Liaoning-provinco — kun grupo da montpintoj staras en Fengcheng-gubernio. Ĝi estas tiel grandioza kiel aliaj montegoj en norda Ĉinio kaj tiel ĉarma kiel tiuj sude de Jangzi-rivero.

La monto ricevis la nomon pro la legendo, ke kiam imperiestro Taizong de Tang-dinastio preterpasis ĝin dum sia inspekta vojaĝo en 627 p. K., en ĝiaj arbaroj kantis birdoj kaj super ĝiaj montpintoj ŝvebis feniksoj. La ĉefa parto de la monto estas granita. Geologoj konstatis, ke en la antikveco tie ondis senlima maro, sed la senĉesa leviĝo de la terkrusto antaŭ 600 milionoj da jaroj kaj la postaj tri monto-faraj movadoj transformis ĝin en krutajn montojn kaj profundajn valojn, kiujn ni vidas hodiaŭ.

En serena printempa tago post pluvo mi, akompanate de la lokano Wang, ekveturis de la gubernia urbeto al la monto. Nia aŭto rapide kuris sur la ŝoseo inter burĝonantaj salikobranĉoj. Tra la aŭta fenestro mi vidis, ke malproksime konturiĝas alta montpinto ĉirkaŭvolvita de nuboj. Wang ektuŝis min per la

mano dirante: “Jen la plej alta pinto de la Feniksa Monto!” Post nelonge nia aŭto turnis sin en kanjonon inter krutaj rokmuoj, sur kiuj klare rekoneblaj estis gravuritaj surskriboj de antikvaj kleruloj. Traveturinte la kanjonon, ni atingis la kvietan kaj ĉarman pitoreskejon de la Feniksa Monto, kie groteskaj montpintoj kaj antikvaj temploj de tempo al tempo elmontriĝis el post la nebula vualo.

Kiam ni paŝis en Ziyang-templon, unu el la tieaj antikvaj konstruaĵoj, Wang diris al mi: “Jam en la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (586-589 p.K.) troviĝis temploj ĉe la Feniksa Monto. Nun neniu povas konstati, kiam konstruiĝis la origina Ziyang-templo, kaj tiu, kiun ni nun vidas, aĝas pli ol cent jarojn.” La ŝtona ŝtuparo kondukis nin en la templon. Vid-al-vide en la mezo staras la ĉefa, kvin-ĉambra domo kun majestaj kaj solenaj cipresoj antaŭ si. Dekstre kaj maldekstre de ĝi staras po tri-ĉambraj flankaj domoj, kaj estas tambur-turo kaj sonoril-turo. La tuta konstruaĵaro, kun suprenlevitaj tegmentorandoj, aspektas impone kaj grandioze.

Tie troviĝas kiosko, kie turistoj povas ripozeti antaŭ sia montogrimpado.

De la templo al la montosupro kondukas du vojoj: la orienta kaj la okcidenta. La okcidenta vojo estas malpli longa, sed pli kruta. Ni do decidis iri supren laŭ la okcidenta kaj malsupren laŭ la orienta por kiel eble plej multe ĝui la montan pejzaĝon.

Ĉirkaŭ la deka antaŭtagmeze la nebulo svenis, kaj la monto montris sin ankoraŭ pli verda ĉe la brila suno. Bonhumore babilante survoje, ni venis al maljuna pinaro, kiu donas al la vojaĝantoj ripozejon malvarmetan kaj kvietan, por sin refreŝigi. Dekstre de la pinaro troviĝas kaverno, ĉe kies aperturo staras giganta ronda ŝtono kvazaŭ mirakle falinta el la ĉielo. Kiel la sola pasejo supren, la kaverno estas 3 metrojn alta kaj pli ol 30 metrojn longa. Ĝin trairinte, ni trovis nin antaŭ krutega rokmuro ĉirkaŭ 50 metrojn alta, sur kiu instaliĝis fera ĉeno. La montogrimpantoj povas grimpi al la supro, firme tenante la ĉenon permane kaj paŝante laŭ la kavoj elhakitaj en la rokmuro. Sekvante aliajn turistojn, mi provis la grimpadon malrapide, kaj la piedo de tiu, kiu grimpis antaŭ mi, preskaŭ tuŝis mian kapon. Kiam mi atingis la supron de la rokmuro kaj rigardis malsupren, mian koron ekpremis timo kaj teruro.

Daŭriginte la grimpadon je kelka distanco, ni venis al la Teraso de Feoj. Ĝi fakte estas plata ŝtonego, sur kiu povas sidi kelkdek homoj samtempe. En ĝiaj fendoj radikas centjaraj pi-

noj. Legendo diras, ke ĉiujare en la 28-a de la kvara monato laŭ la luna kalendaro multaj feoj flugas malsupren de la ĉielo kaj kolektiĝas sur la ŝtonego por ludi ŝakojn aŭ observi la homan mondon. Starante tie, la turistoj povas ĝui la belan panoramon de la monto.

Forlasinte la Terason de Feoj kaj ĉirkaŭirinte montpinton, ni atingis la Feniksan Kaverton, unu el la mirakloj de la monto. Laŭdire, ĝuste el tiu kaverno elflugis feniksoj siatempe. La 200 metrojn longa kaverno formiĝis el grandaj ŝtonoj metitaj unu sur alia. Kvankam ĝia aperturo estas tiel malvasta, ke enpaŝante, ni devis kliniĝi, tamen ne estas mallume interne, ĉar strioj da sunlumo penetras en ĝin tra la fendoj inter ŝtonoj. Estas aparte interese, ke inter malordaj ŝtonegoj en la kaverno troviĝas multe da zigzage interligitaj fendoj, tra kiuj oni povas iri por ĝui la pejzaĝon. Post kiam ni eliris el la kaverno kaj daŭrigis nian grimpadon je kelka distanco laŭ la kruta montvojo, antaŭ niaj okuloj prezentiĝis la Domo de Avalokitesvaro triflanke ĉirkaŭita de krutaj rokmuroj.


La du-etaĝa domo estis konstruita en Ming-dinastio en la 16-a jarcento. En 1982 la popolo a registaro ĝin riparigis, tiel ke ĝi nun ree brilas kun desegnaĵoj de drakoj kaj feniksoj gravuritaj sur siaj traboj kaj ĉevronoj. Se nebulo ĝin vualas, ĝi aspektas kiel paradiza konstruaĵo ŝvebanta en la aero. Kaj eĉ nun en la domo loĝas bonzoj.

Dekstre de la domo abrupte prezentiĝas giganta kalva mont-

pinto, sur kiu etendiĝas firsto pli ol 30 metrojn longa kaj ĉirkaŭ 1 metron larĝa, en formo de bov-dorso, kun profundaj valoj ambaŭflanke. Turistoj devas grimpi supren laŭ la "bov-dorso", sin helpante per la feraj ringoj instalitaj je ĉiu metro kaj la kavoj elhakitaj je ĉiu duon-metro. Tra pasinte la "bov-dorso", ni baldaŭ venis al la Nubo-kolekta Montpinto, la plej alta pinto de la Feniksa Monto, kiu estas je 900 metroj super la marnivelo. Rigardante de sur la montpinto, ni vidis, ke norde montaroj serpentumas, sude Bohai-mar-o etendiĝas ĝis la horizonto kaj la najbaraj montpintoj ondas sub niaj piedoj.

La vento sur la monto fariĝis pli kaj pli forta, kaj mi eksentis malvarmeton. Admonate de Wang, mi, sekvante la aliajn turistojn, descendis laŭ la orienta vojo. Kiam ni revenis al la gubernia urbeto, tie kaj tie lampoj jam ekbrilis en vespera krepusko.






La cêfpinto de la monto Fenikso

LA MONTO FENIKSO

Fotoj de QU WEIBO




La antikva templo Sanguan ĉe la mont-piedo

La Feniksa Ŝtono





La Feniksa Kaverno



La Bov-dorsa Ŝtono larĝa je triona metro kaj longa je pli ol 30 metroj, kun tre profundaj ravinoj ambaŭflanke. La turistoj devas transpasi la ŝtonon por iri antaŭen.





Dipsako

de **RIA HOOGELAND**

(Nederlando)



Efeso (Turkio):
Templo de Adriano

de **ELIO MIGLIORINI**

(Italio)

**FOTOJ FARITAJ
DE E-ISTOJ**

LI QIANG:

Tutlanda Filatelo-Ekspozicio de Ĉinio

*Afiŝo de la Tutlanda
Filatelo-Ekspozicio de
Ĉinio*



DE la 29-a de novembro ĝis la 8-a de decembro de 1983 okazis la Unua Tutlanda Filatelo-Ekspozicio de Ĉinio en la Ĉina Belarta Domo en Pekino. Dum la 10 tagoj 120 000 homoj vizitis la ekspozicion. Ĝi estis la plej granda ekspozicio de privataj filatelaĵoj, okazinta en Ĉinio. Krom 15 grupoj, al ĝi sendis 448 poŝtmarkajn albumojn ankaŭ 422 filatelistoj el 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. La ekspozicio okupis areon de 2 685 kvadrataj metroj.

En la ĉefa halo de la domo ekspoziciigis la poŝtmarkoj de la grupoj, honore kaj speciale invitatitaj partoprenantoj. La valoraj albumoj de multaj famaj veteranaĵoj filatelistoj altiris al si nemalmultajn rigardantojn. Zhu Xuefan, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, fervore subtenas la filatelan aferon kaj

ĉi-foje sendis al la ekspozicio sian valoran filatelaĵon "La Unuatagaj Kovertoj de la Nova Ĉinio". La bildoj de la poŝtmarkoj sur tiuj unuatagaj kovertoj estas ĉefe pejzaĝoj, floroj, teatraĵoj homfiguroj kaj historiaj objektoj. Zhu sigelis la kovertojn per sia sigelo "Maljuna Poŝtisto", kio dotis la kovertojn per aparta gusto.

Kolektiĝis multaj filatelistoj antaŭ la albumo «Ruĝaj Markoj» de fama verkisto Xia Yan, ĉar ĉiu poŝtmarko en la kolekto estas raraĵo. En la komenco la ruĝaj markoj servis ne kiel poŝtmarkoj, sed impostaj markoj. En la komenco de 1897 la registaro de Qing-dinastio komencis sian poŝton, malfermis novajn servojn, pro kio oni bezonis altvalorajn poŝtmarkojn, kaj samtempe anstataŭigi arĝentan taelon per arĝenta dolaro. Sed oni ne povis ĝustatempe presi

poŝtmarkon, oni do anstataŭe uzis tiujn neuzitajn impostajn markojn en valoro de tri centoj, presitajn en Londono, stampinte poŝtmarkan valoron sur ili, por solvi urĝan bezonon. La ruĝaj impostaj markoj estis tre malmultaj, tial ili jam fariĝis tre raraj en Ĉinio. Nun en la mondo ekzistas nur du sesopoj da tiaj markoj kun kosto de 1 yuan-o.

Laŭ la peto sinjoro Lin Wenyan de Hongkongo sendis unu valoran kvaropon da ruĝaj impostmarkoj, kun malgrandaj ideografiaĵoj "unu yuan-o". En la komenco oni presis sur la poŝtmarkoj malgrandajn ideografiaĵojn kaj poste grandajn. Tiam nur tridek pecoj da ruĝaj impostmarkoj estis stampitaj per malgrandaj ideografiaĵoj, kaj nun tiu kvaropo da poŝtmarkoj estas unika en la mondo. La filatelistoj opiniis, ke ĝi estas la plej valoro ĉina poŝtmarko en la Oriento.

La poŝtmarkoj emisiitaj kaj la kovertoj afrankitaj en la liberigitaj regionoj dum la ĉinaj revoluciaj jaroj estis gravaj ekspoziciaĵoj. La kvaropo da poŝtmarkoj kun la ideografiaĵo "Gao" (ĉine signifas "kontribuaĵo") sendita de fama filatelisto Shen Zenghua altiris al si la atenton de la vizitantoj. Tia poŝtmarko estis simple presita sur la telegrama papero, sen dentaĵo kaj brila koloro. Tamen ĝi estas sola speco de poŝtmarko multe atentata de la filatelistoj en la mondo. Tia poŝtmarko estis emisiita en la liberigita regiono de suda Anhui en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito (1937 — 1945) kaj destinita por la uzo de la ĵurnalistoj kaj raportistoj. Tiam la poŝtmarkoj estis emisiitaj malmulte, kompreneble, des pli malmulte konserviĝis. Dum pli ol cent jaroj oni emisiis pli ol 200 000 specojn da poŝtmarkoj en la mondo, sed nur tia poŝtmarko estas unika en sia familio. Ĝi vere estas valoregaĵo inter la filatelaĵoj en la mondo.

Krom la poŝtmarkoj estis ekspoziciitaj ankaŭ dekretoj subskribitaj de Mao Zedong kaj Zhu De kaj koncernaj dokumentoj de la Soveta Registaro pri emisio de poŝtmarkoj en la revoluciaj bazlokoj, kaj ekspeditaj kovertoj uzitaj en la liberigitaj regionoj. Tiuj objektoj estas ne nur valoraj filatelaĵoj, sed ankaŭ valoraj atestaĵoj de la ĉina revolucio.

En la centra halo de la dua etaĝo de la domo ekspoziciĝis poŝtmarkoj konservitaj de 53 mez- kaj element-lernejanoj, inter kiuj la plej juna estas ok-jara Zhang Dong de la provinco Guangdong. Ŝi komencis sian filateladon ekde la vizito de elementa lernejo. La titolo de

ŝia albumo estas «Mi Komencis Filateladon». Ŝi estas bona lernantino kaj ĉiam ordigas la filatelaĵojn post plenumo de hejmtaskoj. La filatelo akcelis ŝian lernadon kaj larĝigis ŝian vidkampon. En la ekspozicio troviĝis honora atesto kaj laŭdaj leteroj pri ŝiaj bonaj lerno kaj konduto. Ŝia albumo akiris porinfanan premion en la konkurso.

La albumoj de la infanoj estas modestaj, sed klare esprimis ilian amon. Lernanto Yan Baogang de la provinco Henan sendis al la ekspozicio albumon kun la titolo "Mi Amas la Patrion". Li klasifikis siajn poŝtmarkojn en diversajn grupojn kun klarigaj vortoj, por ke la poŝtmarkoj konigu al rigardantoj la grandiozajn riverojn kaj montojn, lokajn morojn kaj sukcesojn en la industrio kaj agrikulturo. La filatelo de la infanoj havas alian karakteron, ke ili kunligis la enhavojn de la poŝtmarkoj kun la tekstoj de siaj lernolibroj. Tiel la filatelaĵoj servas por ili kiel viva lernilo.

En la orienta kaj okcidenta haloj kaj en la halo de la tria etaĝo ekspoziciĝis la poŝtmarkoj de la nova Ĉinio kaj albumoj de fakaj poŝtmarkoj de Ĉinio kaj fremdlandoj. La filatelaĵoj de la nova Ĉinio konsistigis la ĉefan parton de la ekspoziciaĵoj. Oni eksponis ĉiujn poŝtmarkajn seriojn emisiitajn de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio, de la 8-a de oktobro de 1949 ĝis oktobro de 1983, inkluzive de memoraj, specialaj, ordinaraj, aeraj, afranko-ŝuldigaj kaj reva-lorigitaj poŝtmarkoj. La eksponaĵoj montris, ke la ĉinaj filatelistoj plenamplekse kolektis kaj penetreme esploris la poŝtmarkojn de la nova Ĉinio. Tio estas rimarkinda karaktero de tiu ekspozicio.

En la ekspozicio gravan lokon okupis la poŝtmarkoj sub fakaj temoj, kies kolekto furoras nun en Ĉinio. La ekspoziciaĵoj ĉiflanke estis tre enhavoriĉaj kaj plenampleksaj. La poŝtmarkoj de pli ol 150 fakaj temoj, ekz. "Emblemoj sur la Poŝtmarkoj de la Nova Ĉinio", "la Ĉina Historio", "Pekino — la Ĉefurbo de la Granda Patrio", "Gemoj de la Antikva Ĉinio", altiris al si multajn interesatojn. Nemalmultaj vizitantoj kaj rigardis kaj notis. Antaŭ la albumo "La Plej-oj de Ĉinio en la Mondo" kolektiĝis plej multe da vizitantoj. En kvin vitrinoj troviĝis 54 paĝoj da poŝtmarkoj, kiuj inkluzivas antikvajn inventaĵojn, modernajn teknikojn, ĉinajn tradiciajn valoregaĵojn kaj elterigitajn historiajn objektojn sub pli ol 130 artikoloj de 14 kategorioj. Ĉi tiu albumo vive montras al vizitantoj la plej-ojn de Ĉinio en la mondo, kio pliardigas ilian amon al la patrio. La eksponaĵoj estis tre bonvenaj.

En la orienta halo de la tria etaĝo oni ekspoziciis fremdlandajn fakajn poŝtmarkojn. Tie oni povas vidi poŝtmarkojn, unuataĝajn kovertojn kaj afrankitajn kovertojn de Koreo, Japanio, Sovetunio, Usono, Hungario, Rumanio, Britio, Francio kaj aliaj pli ol cent landoj kaj regionoj. La pli ol 50 fakaj poŝtmarkoj temas pri belarto, muziko, pejzaĝo, sporto, animalo, vegetalo, trafiko, arkitekturo k. a. La albumo "Historio de Pikturo" konigas per pentraĵoj sur poŝtmarkoj la historion de la monda pentroarto. La poŝtmarkoj kun bildoj de elitaj freskoj, oleopentraĵoj, skizoj kaj aliaj artaĵoj de diversaj dinastioj plezurigis ĉiujn vizitantojn. La albumo "Eŭropa Muzika Historio" konigis 128

komponistojn kaj iliajn reprezentantajn verkojn ekde la 17-a jarcento. Tiuj belaj poŝtmarkoj plivastigas vidkampon kaj helpas koni la mondon.

Inter la eksponitaj fremdlandaj poŝtmarkoj troviĝis Esperantaj poŝtmarkoj, kiuj vekis grandan intereson ĉe la rigardantoj. Esperantisto Song Shengtan, kiu laboras en la urbo Nankino de la provinco Jiangsu, kolektis multajn Esperantajn poŝtmarkojn. En sia kvina numero de 1983 nia gazeto publikigis lian artikolon "Mi kaj Esperanto-Filatelo". Liaj poŝtmarkoj sur 24 kartoj okupis du vitrinojn, ĉe kies supro estis la titolo "Artefarita Lingvo Esperanto". Tiuj Esperantaj poŝtmarkoj spegulis la historion de Esperanto-movado kaj praktikan oportunecon de Esperanto. En la konkurso li akiris arĝentan medalon, plej altan el la premioj gajnitaj de filatelitoj pri fremdlandaj poŝtmarkoj. Ĉiuj ĉinaj esperantistoj ĝojis de tio.

Por memori tiun grandskalan ekspozicion la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio emisiis serion da poŝtmarkoj pri la Ĉina Filatelo-Ekspozicio. Tiu serio konsistas el du pecoj kun desegnoj de malnovaj poŝtmarkoj unu el kiuj estas la "nacia emblemo" en valoro de ok cendoj kaj la alia la "Pagoda Monto de Yan'an" en valoro de dudek cendoj. Samtempe la kompanio ankaŭ emisiis kovertojn pri la filatelo-ekspozicio kaj unuataĝajn kovertojn kun la du poŝtmarkoj. Por tiu ekspozicio oni ankaŭ presis delikatajn memorajn kartojn sen indiko de valoro kaj eldonis memorajn kovertojn kun kupra medalo de la Ĉina Filatelo-Ekspozicio. Ĉiuj tiuj delikataj memoraĵoj pleje interesis la vizitantojn.



Ruĝa impostmarko kun malgrandaj ideografiaĵoj, emisiita en Ĉinio en 1897, servis kiel poŝtmarko en valoro de unu juano.



Kvaropo da poŝtmarkoj emisiita en la Huainan-a Liberiĝinta Regiono dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistomilito (1937-1945)

VOJO AL LA HOMA KORO

—Pri filmaktoro Pan Hong

KARAJ legantoj, ĉu vi legis la fragmenton el la novelo “En Mezaĝo” aperigitan en la numero 2, 1981 EPĈ? Ĉu vi konis la kortuŝan ĉinan klasikan tragikan novelon “Du Shiniang Indigne Dronigis Trezor-keston”? Ĉi tie ni konigas al vi junan filmaktorinon Pan Hong, ĉefrolulinon en la filmoj “En Mezaĝo” kaj “Du Shiniang”, al kiuj oni adaptis la du novelojn.

En 1976 Pan Hong diplomitiĝis el la prezenta fakultato de la Ŝanhaja Teatra Instituto. Ekde tiam ŝi okupiĝis pri kreado de filmaj figuroj kaj sinsekve ludis gravan rolon en la filmoj “Filino de Sklavo”, “Karavano en Dezerto”, “Aflikta Rido”, “Sunradioj el Nubaro”, “Kanto en Viv-

kirlaĵo” kaj aliaj. Ŝi estas unu el la eminentaj ĉinaj junaj filmaktoroj aperintaj en la lastaj jaroj. Ŝia ludado estas modesta, senafekta, implica kaj nuanco-riĉa. Precipe ŝiaj grandaj, nigraj okuloj, fidoplenaj kaj melankoliaj, estas aparte esprimriĉaj. Pan Hong sukcese kreis malsamajn filmfigurojn ĉu en aspekto ĉu en spirito. Precipe la edzino de la ĵurnalisto en “Aflikta Rido”, la fama antikva prostituitino Du Shiniang en la samnoma filmo kaj la okulkuracisto Lu Wenting en “En Mezaĝo” ludataj de ŝi estas plej elstaraj kaj plej kortuŝaj. Tial multaj recenzistoj laŭdis, ke ŝi estas karaktera aktoro iranta al la homa koro.

Jam de la infanaĝo Pan Hong

ekŝatis poemojn kaj estis eminenta en lernado. Ŝia vivvojo ja ne estis glata. Kiam ŝi ankoraŭ estis infano, ŝiaj gepatroj eksedziĝis, kaj poste forpasis ŝia patro. Eble influite de la malglata vivo, ŝi aparte ŝatas tragedion. Ŝi legis multajn famajn tragediojn kaj koncernajn traktatojn de Ĉinio kaj aliaj landoj. Sursceniĝinte ŝi ankoraŭ tre amas tiujn verkojn. Ŝi opinias, ke per arto prezenti ian tragikan vivon ĝuste celas reformi iujn tragikajn realaĵojn en la vivo. Profunda tragedio riĉa je filozofaj sugestoj povas vekti meditadojn, inspiron kaj stimolon ĉe la rigardantoj. En la lastaj jaroj la heroinoj kreitaj de ŝi preskaŭ ĉiuj portis tragikan koloron.

Du Shiniang estis tragika per-

Pan Hong en antikva kostumo ludas la rolon de Du Shiniang en la tragedio “Du Shiniang”.



Pan Hong rolas kiel ĉefrolulino en la filmo “En Frosta Nokto”.



sono, kiu falis en prostitutecon, sed havis noblan spiriton. Por la idealo kaj feliĉo ŝi volonte suferis, sed neniam genuiĝis antaŭ riĉuloj. Poste ŝi sin liberigis el la bordelo kaj edziniĝis al iu junulo. Sed kiam ŝia monavida edzo vendis ŝin al diboĉa juna sinjoro, ŝi severe riproĉis sian edzon kaj la sinjoron, indigne dronigis sian trezor-keston en riveron kaj sin ĵetis en la riveron. Per sia ago ŝi akuzis la feŭdan socion pri ĝia hipokriteco kaj krimo. Kiel prezenti la apartan karakteron de tiu antikva fama prostituitino. Pan Hong legis multajn historiajn materialojn kaj klasikajn romanojn por koni karakteron de tiamaj personoj kaj komencis lerni ludon de sep-korda liuto kaj ĉina ŝako, ĉinajn kaligrafion kaj pikturon, bone mastratajn de tiamaj famaj prostituitinoj. Ŝi kreis en sia dormoĉambro tiaman medion por kapti la karakteron kaj psikon de la filmaj personoj. Fine ŝi bone prezentis ne nur aspekton kaj sintenon de la antikva fama prostituitino, sed ankaŭ ŝiajn karakteron kaj animon. Precipe en la

sceno, en kiu Du Shiniang informiĝis, ke ŝi estis vendita de sia edzo al diboĉa juna sinjoro, la prezentado de Pan Hong, de ĉiu movo ĝis ĉiu okulesprimo, sentigas al la spektantoj fortegan oponon kaj kriojn de Du Shiniang el la anima profundo, kiam oni rigardis ŝiajn drastan malesperon kaj ekstremajn malĝojon.

Lu Wenting estas la heroino en "En Mezaĝo", kreita de Pan Hong, kun klara tragika trajto kaj arta ĉarmo, kaj tio estas mejloŝtono sur ŝia arta vojo.

Lu Wenting estas ordinara mezaĝa okulkuracistino. Dum pli ol 20 jaroj, ŝi ĉiam silente travivis diversajn suferojn, reŭsojn kaj malfacilaĵojn en la vivo kaj konsciencie plenumis sanktan devon de la kuracisto, eĉ en grava malsano. Per delikata priskribo pri la interna mondo de Lu Wenting, ŝia edzo Fu Jiajie kaj kelkaj aliaj mezaĝaj intelektuloj kaj pri ilia sorto, la filmo profunde prezentas ilian belan animon, karakterojn kaj pens-trajtojn de mezaĝaj intelektuloj kaj seriozan socian proble-

mon pri plibonigo de la aktuala situacio de la mezaĝaj intelektuloj. Antaŭ kaj eĉ post la ekfil-mado iuj diris, ke Pan Hong, bela junulino, ne sukcesos bone ludi la rolon de mezaĝa intelektulino travivinta suferojn en la vivo. Sed ŝi mem estis fidoplena. Ŝi faris decidon en la koro: "Mi nepre forgesigos al la spektantoj Pan Hong kaj memorigos Lu Wenting."

Por tio Pan Hong dufoje spertis la vivon de kuracisto en la hospitalo kaj tie serĉis spurojn de Lu Wenting eĉ la sennombraj mezaĝaj kuracistoj. Ŝi kune kun okulkuracistoj iris al laborejo, kontrolis malsanulajn ĉambrojn, faris servon al pacientoj, eniris operacian ĉambron, kune kun ili manĝis kaj gastis en ilia hejmo. Ŝi iom post iom trovis la amindan karakteron de Lu Wenting, kiu, svelta kaj malforta, povas toleri kaj elteni ĉiajn malfacilojn kaj suferojn por la sankta medicina afero kaj elimini malsanon de la popolanoj, kaj havas eksterordinaran persistemon kaj sinoferan spiriton.

Ŝi resumis la karakteron de Lu Wenting en du vortojn "toleremo kaj persistemo". Por krei naturan kaj vivan figuron de Lu Wenting, modesta persono, ordinara kuracistino, edzino kaj patrino de du infanoj, Pan Hong ĉiam senafekte prezentis sian heroinon antaŭ kamerao. Ĉar ŝi opiniis, ke Lu Wenting ne estas sensacia heroino, ŝi estas nur silkraŭpo silente sekrecianta silkon. La spektantoj rigardis ĝuste la puran, bonkoran, honestan kaj belan animon de Lu Wenting kaj sentis la fortan pulsadon de la mezaĝaj intelektuloj, dank' al la aŭtentika, modesta kaj natura prezentado de Pan Hong, ĉu kiam Lu Wenting debutis en la

Juna filmostelo Pan Hong ludas la rolon de Lu Wenting en la filmo "En Mezaĝo".




hospitalo, aŭ kiam ŝi pene antaŭeniris fronte al malfaciloj en la vivo, aŭ kiam ŝi absorbite laboris en malsanula ĉambro aŭ antaŭ operacia stablo. Pan Hong speciale kreis okulesprimojn por prezenti la rolon en diversaj malsamaj medioj kaj humoro: En ambulatorio aŭ antaŭ operacia stablo ŝiaj okulesprimoj estas apatiaj, seriozaj kaj absorbitaj, hejme lacaj kaj senfortaj en baraktado kaj en la studentaj jaroj modestaj, simplaj, seriozaj kaj viglaj; sed tiuj en la amo al Fu Jiajie estas fervoraj kaj seriozaj. Precipe en la sceno, kiam Lu Wenting estas en danĝera malsano, Pan Hong prezentas la malsaman animstaton de la mortanta malsanulo al la laboro, pacientoj, kolegoj, geamikoj, la edzo kaj gefiloj per kvieta, delikata, nebula kaj ŝanĝiĝa rigardoj kaj akiris kortuŝan efekton de arto.

Ĝuste pro tia senĉesa strebado de Pan Hong en filmado, la figuro de Lu Wenting ricevis varmajn laŭdojn de la vasta spektantaro kaj fakuloj. En la printempo de 1983, Pan Hong ricevis samtempe la premion "Ora Koko" kaj la premion "Cent Floroj" de la plej bona aktorino.

Pan Hong estas aktorino diligenta. Apenaŭ fininte sian ludon de la rolo de Lu Wenting, ŝi jam komencis ludi novan rolon en la filmo "Frosta Nokto", al kiu adaptiĝis la samtitola romano de la fama ĉina verkisto Ba-kin verkita en la kvardekaj jaroj. Ŝi ludos denove tragikan heroinon en la filmo. Ŝia tasko estas precize prezenti la penson, karakteron kaj sorton de la heroino, por ke la rigardantoj konu la profundan signifon de la filmo.

Kun klara celo Pan Hong senŝanceliĝe kaj persiste iras la vojon de arto al la homa koro.



Sceno el la danco "Oferfaro"

CAO BAILONG:

MUZIKO KAJ DANCO

ANTAŭ nelonge muzikaj amatoroj en Pekino kun emocio spektis programeron «Muziko kaj Danco de Chu-regno» prezentitan de la Hubei-a Kantodanca Ensemblo. Ĝi ree prezentis per belaj melodioj kaj ĉarmaj dancoj la vivajn scenojn de oferfaro, terkulturado, militado kaj muziko-ludo dum palaca festeno de chu-anoj loĝantaj en la baseno de Jangzi-rivero antaŭ 2 400 jaroj. «Antikva Muziko», ludata per ok specoj de antikvaj muzikiloj, reaperigis majestecon kaj sonvariecon de antikva orkestro. «Dancoj pri Terkulturaj Aferoj» montris scenojn de laboro kaj vivo de chu-anoj. «Plu-

kado de Morusfolioj», per originalaj dancopozoj, bildigis graciajn figurojn de knabinoj kolektantaj morusfoliojn; «Ĉasado», karakterizita per duraj movoj, priskribis ĝojajn ĉasistojn post riĉa ĉasado; «Plugado kaj sarkado» spegulis laborajn scenojn de chu-anoj. «Danco en Palaca Festeno de Chu-regno» plej ravis la spektantojn. Antaŭ la kuliso pendis vicoj da sonoriloj ludataj de muzikistinoj. En akompano de la bela melodio korifeino ekdancis, svingante 3-metre longajn manikojn, kio montris kolorajn kaj pompajn scenojn en la palaca festeno de Chu-regno.



Sceno el la danco "Ĉasado"

ANTAŬ 2 400 JAROJ

La programero estis kreita laŭ la grava arkeologia eltrovo en Hubei. Maje de 1978, arkeologoj trovis, en la tombo de markizo Yi de Zeng en la periodo Militantaj Regnoj en Suixian-gubernio de la provinco Hubei, gamosonorilaron kaj ŝtonplatan gamoperkut-instrumentaron, tamburon kun birdfigura subtenilo, dek-kordajn muzikilojn kaj aliajn, sume 124 muzik-instrumentojn. Tio estis senprecedenca malkovro en la arkeologia kaj muzika historioj de Ĉinio. Fakuloj nomas ĝin subtera koncertejo. Inter la eltrovoj la plej kara kaj plej granda estas la gamosonorilaro, kiu konsistas el 65 malsamgrandaj sonoriloj, pendantaj en

supra, meza kaj malsupra vicoj sur framo longa 13 metrojn kaj alta 2.7 metrojn. La gamosonorilaro pezas pli ol 2 500 kilogramojn. Kaj sur la sonoriloj estas ĉizitaj pli ol 2 800 ideografiaĵoj, kiuj rakontas pri la muzika teorio antaŭ Qin-dinastio (antaŭ la tria jarcento a.K.). Specialistoj konstatis, ke la gamosonorilaro povas produkti sep tonojn kaj kvin duontonojn, kio formas kompletan dekdu-tonan sistemon. La tonoj produktataj de la gamosonorilaro ampleksas ĉiujn kvin oktavojn. Kaj ĉiu sonorilo povas produkti du malsamajn tonojn, kiuj harmonie interrilatas intervale, kio estas originala en la historio

de mondaj muzik-instrumentoj. Per ĝi oni povas ludi muzikaĵojn kun akordo, polifonio aŭ variacio. Dum ludado kvin-sep muzikistoj ilin frapas per martelo aŭ bastono — la spektaklo estas tre grandioza.

Reproduktaĵoj de la rara gamosonorilaro estas sukcese elfaritaj dank' al la kunlaborado de arkeologoj, historiistoj, muzikistoj, metalurgiistoj, akustikistoj kaj fakuloj de muzik-instrumenta fabrikado. Post rigora reĝustigo laŭ internacia norma tonalo la tembro de la reproduktaĵoj atingis tiun de la originala. Oni ludis ĝuste tiujn reproduktaĵojn en la prezentado de «Muziko kaj Danco de Chu-regno».

Dum la kreado de «Muziko kaj Danco de Chu-regno», la artistoj de la Hubei-a Kantodanca Ensemblo kolektis en diversaj lokoj de Hubei-provinco koncernajn materialojn de antikvaj muzikaĵoj por revivigi "la subteran koncertejon" kaj por konformigi la muzikaĵojn, dancojn, dekoraĵojn, kostumojn al la historio kaj precize reaperigi la simplan, duran, romantikan kaj pompan karakterizaĵojn de la kulturo kaj arto de Chu-regno.

La elterigo de la gamosonorilaro kaj la prezentado per ĝiaj reproduktaĵoj sensaciis ĉe la muzikistaj rondoj en kaj eksterlanda. Fama ĉina muzikisto He Luting diris: "Iuj flankoj de la antikva muzika historio de Ĉinio devas esti restuditaj." La mondfama violonisto Yehudi Menuhin diris: "La muziko de la antikva Grekio estas agnoskata de la tuta mondo, sed ĝiaj muzikiloj estis faritaj el bambuo. Ili ne estis konserveblaj ĝis hodiaŭ. Nur ĉinaj muzikiloj ebligas al ni aŭskulti muzikon antaŭ 2 000 jaroj."

EN 1986

LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZOS EN ĈINIO!

Ĉu vin interesas la bela orienta antikva lando?
Jen ni rekomendas al vi la ĵus aperintan libron:

40 Vidindaj Lokoj en Ĉinio

Tiu ĉi libro konigas al vi 40 plej famajn kaj facile viziteblajn vidindajn lokojn, inkluzive de la Granda Muro, la Malpermesita Urbo, la Somera Palaco, la Tri Montgorĝoj ĉe la rivero Jangzi, la enterigita terakota legio k.t.p. Krom la priskriboj pri la pejzaĝoj vi legos ankaŭ interesajn legendojn kaj popolrakontojn pri tiuj lokoj. Post la legado vi ekhavas ankaŭ iom da historiaj scioj pri Ĉinio. Kun koloraj bildoj kaj pentraĵoj.

Esperantigita de Censinio

Polurita de Geoffrey Sutton

Ilustrita de Lu Dacheng

Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Formato: 119×185mm. 272 pĝ.

Prezo: £1,90 US\$3,90

Numero: 12-Es-1825P




Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC
aŭ Internacia Libro-

Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

STUDENTINOJ EN DIMANĈO


Fotoj de SHEN YANTAI



En dimanĉo ili kutime
ellitiĝas pli malfrue.

En gaja babilado





Interesa kuirado



Fliki veston por studentoj



Ili ŝatas ekskursi bicikle.






Si estas diligenta.



La knabino ŝatas sian litkovrilon ĉiam pura.

Ŝi ludas ŝakon kun sia frato en la hejmo.




Gimnastikaj amatorinoj



YU FENG:

Loko aspirata de islamanoj



Imamo Ma interparolas kun la prezidanto de Pakistano generalo Zia Ul Haq en la moskeo.

LA mondfama antikva urbo Xi'an situas en Shaanxi-provinco de nordokcidenta Ĉinio. En la historio la urbo nomiĝis Chang'an. Meze de ĝi troviĝas multaj historiaj lokoj, inter kiuj estas la moskeo Huajue, grandioza kaj impona. Ĝi estas unu el la gravaj historiaj lokoj protektataj de la ŝtato. Tie la islamanoj de la urbo faras religiajn aktivadojn.

En iu pluveta mateno de la lasta somero mi vizitis tiun moskeon kaj estis varme akceptita de imamo Ma Liangji. Akompanate de li, mi rigardis la moskeon en pluvo. Li detale koniĝis al mi la antikvaĵojn kaj konstruaĵojn de la moskeo.

Tie steleo rakontas, ke la moskeo konstruiĝis en 742 p. K., t.e. post cent jaroj, kiam islamismo estis enkondukita en Ĉinion. En Ĉinio islamismo estas nomata ankaŭ huj-religio. Ĝi estas kredata de la huj-a, uĝgura, kazaha kaj aliaj sep nacimalplimulto de Ĉinio. Krom la supre menciita moskeo estas famaj en nia lando ankaŭ la moskeo Luma Pagodo


en Kantono (laŭ onidiro ĝi estas la unua moskeo en Ĉinio), la moskeo Fenikso en Hangzhou, la moskeo Unukornulo en Quanzhou, la moskeo Gruo en Yangzhou kaj la Islama Preĝejo en Pekino.

La moskeo Huajue distingiĝas per antikva ĉin-stila arkitekturo. La eleganta preĝhalo en la moskeo havas majestecon de la religia konstruaĵo kaj imponecon de la ĉina palaco. La halo, kiu povas enteni pli ol mil preĝantojn, aspektas tre bele post kolora lakado kaj pentrado. En ĝia plej malantaŭa korto staras luksa pavilono, ambaŭflanke po delikata arkaĵo. La pavilono kun la arkaĵoj similas al fenikso kun disetenditaj flugiloj. Pro tio oni nomas ĝin Fenikso-pavilono. Imamo Ma diris al mi, ke estas unusola en Ĉinio tia konstruaĵo kuniganta pavilonon kaj arkaĵojn.

La moskeo havas multajn kortojn interligitajn per zigzagaj vojoj ombrataj. En la kortoj bonodoras raraj floroj, kuriozas diversformaj ŝtonoj kaj staras

antikvaj steleoj kun surskriboj pri la islamismo en la ĉina kaj araba lingvoj. Plej interesas min la Luna Steleo, per kiu oni povas kalkuli la fastajn datojn laŭ la luna fazo kaj islama kalendaro. La steleo estis konstruita en 1732 p. K. Tie oni povas vidi elegantajn kaligrafaĵojn kaj meblarojn kun antikva islama trajto. La harmonia aranĝo de la domoj, balkonoj, pavilonoj, haloj, floroj, arboj, ŝtonoj kaj aliaj pejzaĝoj montras originan ĉinan nacian trajton.

Akompanate de imamo Ma, mi venis al la ripozhalo kun antikva kaj kurioza stilo kaj tie ĝuis bovlon da aroma kaj refreŝiga teo. La bovlo kun kovrilo estis metita sur kupra telerosoklo. Kun scivolemo mi unuafoje trinkis la teon, sen demeto de la kovrilo. En la halo kuŝas la nigra lito "Heroo por Sendependeco" el malmola ligno, inkrustita per gemoj, farita en la 17-a jc. En la pasinteco nur merithavaj herooj kaj honoraj gastoj rajtis sidi sur ĝi. Sed hodiaŭ la reguloj estas abolitaj. Ankaŭ



Portalo de la moskeo

mi, ordinara homo, estis permesita sidi sur ĝi.

En la halo mi informiĝis de la imamo, ke de post 1978 la moskeo akceptis sume 150 000 islamanojn kaj aliajn vizitantojn el pli ol 80 landoj kaj regionoj. Nun ĝi jam fariĝis loko aspirata de la tutmondaj islamanoj. Ĝin vizitis ankaŭ prezidantoj, ĉefministroj kaj ministroj pri religiaj aferoj de iuj landoj. El ili la unua vizitanto estis la ĉefministro de Maroko. Ĝuste en tiu tago okazis diservo, kaj la maroka ĉefministro kun plezuro ĉeestis la solenon en la moskeo kune kun centoj da ĉinaj islamanoj. Post la preĝado li skribis en la notlibro: “Hodiaŭ estas por mi la plej feliĉa tago en mia vivo.” En la nomo de la reĝo Hassan la Dua li donacis al la moskeo lukse binditan Koranon en la araba lingvo. Satelito televidigis al Maroko la aktivadon, kiel la ĉinaj islamanoj varme akceptis la marokan ĉefministron.

En la vizito mi informiĝis, ke imamo Ma estas erudicia kaj profunde konas la Koranon. Li estas konstanta membro de la

Ĉina Islama Asocio kaj kumulas aliajn gravajn oficojn. Li ĝuas grandan reputacion en la urbo. Prenante la Koranon kiel komunan lingvon, li amikiĝis kun multaj eksterlandaj islamanoj. Inter ili estas prezidanto de Pakistano generalo Zia Ul Haq, kiu foje speciale veturis al tiu moskeo por ĝin viziti. Ĉeestinte la diservon, li ĝojplene diris al imamo Ma: “Mi ĝojas, ke hodiaŭ mi havis ŝancon ĉeesti la diservon kune kun ĉinaj islamaj gefratoj. Nun mi propraokule vidis, ke vi havas plenan liberecon en religia kredo.” Antaŭ la forlaso de la moskeo, li donacis al imamo Ma sian ŝatatan rozarion. Reveninte al sia hejmlando, li sendis al la ĉinaj islamanoj leteron plenan de entuziasmo, en kiu li priskribis sian impreson pri tiu antikva moskeo.

Imamo Ma estas entuziasma patrioto. Foje kiam li akceptis usonan vizitgrupon, li petis usonajn amikojn, kiuj laŭplane veturos al Taivan, kunporti la panoramon de lia moskeo al la islamaj fratoj de la moskeo de Tai-bei. Li diris, ke li esperas, ke rapide Ĉinio reunuiĝos kaj ĉiuj

islamanoj de la tuta lando povos konstrui en granda solidareco la socialisman patrolandon.

Akceptante la eksterlandanojn, imamo Ma ofte devis respondi al iliaj demandoj.

“Kiamaniere vi predikas al islamanoj la socialismon de via lando en via moskeo?” demandis membro de iu eksterlanda religia vizitgrupo.

“En la moskeo mi predikas ĉefe la Koranon, islamajn dogmojn kaj aliajn koncernajn problemojn, ekz. tiujn pri paco kaj justeco. La Korano postulas, ke ni dediĉu nin al la paca afero.”

Eksterlandaj gastoj ofte prezentis interesajn kaj konkretajn demandojn, al kiuj la imamo ankaŭ respondis laŭ la reala stato.

“Ĉu oni povas fari diservon en sia oficejo dum la laborhoroj?”

“Ne.”

“Kial?”

“Laboro estas afero kolektiva, dum la diservo estas kredo de individuoj. Oni ne rajtas fari malutilon al la kolektiva afero per la individua kredo. Oni povas fari diservon post la laborhoroj, kio tute konformas al la Korano.”

La antikva moskeo kaj elokventa imamo Ma impresis min profunde. Ĉe mia adiaŭo venis al ĝi ses eŭropaj vizitantoj. Ili vizitis ĝin antaŭ kelkaj tagoj kaj nun venis adiaŭi la imamon. Kun profunda sento ili diris al la imamo, ke post la reveno al sia hejmlando ili konigos siajn parencojn kaj amikojn pri la moskeo, por ke pli multe da homoj vizitu tiun imponan preĝejon.

La Naskiĝo de la Norda Song-dinastio kaj Ekonomia Disvolviĝo

ARMEA RIBELO ĈE CHENQIAO

EN la lasta periodo de la Kvin Dinastioj Zhao Kuangyin, gvardia komandanto de la Posta Zhou-dinastio, iom post iom alprenis la militan potencon en siajn manojn. Vidante ke la imperiestro estas infanaĝa, Zhao Kuangyin do konspiris por uzurpi la tronon. En la 1-a de la unua monato laŭ la ĉina lunkalendaro de 960 p.K., kiam la tuta kortego celebris la feston, oni raportis pri malamika invado. Ne tute konante la fakton la kortego haste sendis Zhao Kuangyin komandi grandan armeon por la rezisto. La armeo komandata de Zhao foriris kaj kampadis en Chenqiao, nemalproksime de la ĉefurbo.

Tiunokte, instigite de Zhao Kuangyin, lia fidinda subulo diris al aliaj generaloj: “La imperiestro estas tro juna por ordigi la ŝtatajn aferojn. Kiu scios, ke ni rezistos kontraŭ la invadantoj riskante nian vivon? Pli bone ni unue surtronigu nian komandanton kaj poste marŝu norden.” Ĉiuj generaloj konsentis lian proponon.

Matene de la sekvanta tago la generaloj viciĝis kun armilo en la mano kaj kriis laŭte: “Nun ni sincere petas nian komandanton imperiestriĝi!” Antaŭ ol Zhao Kuangyin faris respondon, liaj fidindaj subuloj jam surmetis sur lin flavan robon (kostumo

speciale por imperiestro) kaj kondukis lin al la halo. Ĉiuj generaloj genuiĝis kaj unuvoĉe kriis: “Vivu, Via Imperiestra Moŝto!” Tiamaniere Zhao Kuangyin oficiale surtroniĝis kaj nomis sian imperion Song. Li estis la unua imperiestro de Song-dinastio. Poste la armeo de Song-dinastio konkeris ĉiujn aliajn separatismajn fortojn unu post alia kaj fundamente unuigis Ĉinion. Historiistoj nomis ĝin Norda Song-dinastio kaj Zhao Kuangyin — Taizu. (Taizu signifas fondinton de dinastio en la ĉina lingvo.)

CENTRALIZISMO DE LA DINASTIO

Surtroniĝinte, Taizu decidis repreni la komandon de la gravaj korteganoj por likvidi la separatismen aperintan en la lastaj jaroj de Tang-dinastio.

Iun tagon, Taizu donis feste-

non al siaj altrangaj generaloj, dum ĝojdrinkado li diris: “Sen via subteno mi ne estus tia, kia hodiaŭ, sed tamen kiel imperiestro mi havas multe da komplikaĵoj, kaj mi eĉ ne povas trankvile dormi!”

Lia grava generalo Shi Shouxin kun miro demandis: “Pro kio?” Taizu respondis: “Kiu ne volas sidi sur mia trono?”

Shi Shouxin diris: “Via imperiestreco estas destinita de la ĉielo. Kiu aŭdacus havi alian ideon?”

Taizu diris kun rideto: “Kvankam vi ne havas alian ideon, tamen, iun tagon, se viaj subuloj surmetos sur vin flavan robon, kion vi faros?”

Aŭdinte tion, la generaloj senescepte genuiĝis, petante, ke la imperiestro montru al ili ĝustan vojon.

Armea Ribelo ĉe Chenqiao



Taizu diris: “La homa vivo estas mallonga. La profitemulo deziras nur akiri pli multe da riĉaĵoj por ĝui feliĉan vivon. Mi pensas, ke pli bone vi forlasu la komandon kaj fariĝu prefektoj, aĉetu kampojn kaj domojn por viaj posteuloj kaj havigu pli da kantistinoj kaj dancistinoj por vin amuzi dum la tuta vivo. Poste mi boparenciĝos kun vi, tiel ni ĉiuj vivos sensuspekto kaj paco. Ĉu bone?”

En la sekvanta tago, la generaloj, pretekstante malsaniĝon, petis la imperiestron senigi ilin je la komando. Taizu hipokrite konsolis ilin, donacis al ili multajn riĉaĵojn, senigis ilin je komando kaj nomumis ilin prefektoj.

La rimedoj de Taizu fortigi la centralizismon preventis separatismen de ambiciaj generaloj kaj protektis la landan unuiĝon. Sed pro la multfoja manovrado de armeoj kaj transpostenigo de generaloj estiĝis la situacio, ke “la armeoj ne havas fiksaĵn komandantojn, kaj la lastaj ne fiksaĵn trupojn”, “la generaloj ne konas siajn soldatojn, kaj la lastaj ne siajn generalojn”. Tio fariĝis unu el la gravaj kialoj, kial la Norda Song-dinastio ofte malvenkis en la batalo kontraŭ la regnoj Liao kaj Okcidenta Xia.

POLITIKA REFORMO FARE DE WANG ANSHI

En la meza periodo de la Norda Song-dinastio la registara elspezo ĉiam dilatiĝis pro senĉesa pligrandigo de la armeoj, plimultiĝo de ŝtataj oficistoj kaj la kompensmonsumo donita pro la malvenkoj en la bataloj kontraŭ la regnoj Liao kaj Okcidenta Xia. Por kovri la deficiton la registaro senĉese pliigis la impostojn, kio superŝarĝis la kamparanojn. Atakite de naturaj katastrofoj la

kamparanoj, sen vestoj kaj manĝaĵoj, estis devigataj pruntepreni uzuran monsumon aŭ migri aliloken. En nemalmultaj lokoj leviĝis kamparanaj insurekcioj. La armeoj de la regnoj Liao kaj Okcidenta Xia ofte invadis la Nordan Song-dinastion kaj serioze minacis ĝian sekurecon.

Kiam la Norda Song-dinastio alfrontis politikan, militan kaj ekonomian krizon, ĉefkortegano Wang Anshi proponis al imperiestro Shengzong politikan reformon por savi la reĝimon el la krizo. Lia politika reformo enhavis ĉefe: Grenplanta Kodo, t.e., en la tempo, kiam ĉe kamparanoj estas portempa grena malabundo la registaro pruntas monon al kamparanoj por bridi la ekspluatadon de la uzurantoj al la kamparanoj; kontraŭserva kodo, t.e., la senjunulaj familioj donas monsumon por sin liberigi de soldatiĝo, kaj aliaj kodoj por reguligi prezaron, bridi akaparon kaj nuligi merkatan malordon, mezuri agron, reguligi impostojn, kun celo preventi agrokasadon fare de la grandaj bienuloj. Krome li publikigis ankaŭ militajn sistemojn por riĉigi la landon kaj fortigi la armeon.

La novaj kodoj alportis malutilon al la grandaj bienuloj, komercistoj kaj uzurantoj kaj sekve estis firme kontraŭstarataj de iuj nobeloj kaj korteganoj. Ili eĉ atribuis al Wang Anshi montofalon, sekegecon kaj aliajn plagojn. Antaŭ la kalumnio Wang Anshi firmdecide diris: “La natura ŝanĝiĝo ne estas timinda, la pravo ne imitindaj kaj la onidiroj ne terurindaj.”

La praktikado de la novaj kodoj pliigis la enspezon de la registaro, solvis ĝian financan malfacilon kaj ankaŭ fortigis ĝiajn militajn fortojn. Sed pro la mal-

cedema opono de la konservativaj burokratoj, imperiestro Shenzong fine devis eklogi ĉefkorteganon Wang Anshi. Post la morto de Shenzong la novaj kodoj estis abolitaj.


INSUREKCIOJ DE FANG LA KAJ SONG JIANG

Post abolo de la novaj kodoj la politiko de la Norda Song-dinastio fariĝis pli putra. La imperiestra familio kaj la burokratoj vivis diboĉe. Por konstrui palacojn kaj ĝardenojn, imperiestro Huizong sendis perforte kolekti inter popolanoj rarajn florojn kaj kuriozajn ŝtonojn en la suda parto de la lando. Ankaŭ la ŝtataj oficistoj koruptiĝis kaj ĉantaĝis, profitante la ŝancon. Tio bankrotigis multajn homojn, ke ili eĉ devis vendi siajn gefilojn por vivteni sin. La popolanoj, perdinte vivrimedon, leviĝis al ribelo.

En 1120 en Zhejiang Fang La gvidis la tieajn popolanojn al ribelo, la ribelantoj konkeris en sinsekvaj monatoj 6 subprovincajn urbojn kaj 52 guberniojn de la provincoj Zhejiang, Anhui kaj Jiangxi, mortigis multajn ŝtatajn oficistaĉojn. La registaro sendis fortajn armeojn sieĝataki la ribelantan armeon. La kamparana armeo fine estis venkita kaj ankaŭ Fang La heroe mortis en la batalo.

Samtempe kun la leviĝo de Fang La la kamparanoj en la nordo ribeliĝis sub la gvidado de Song Jiang. La ribelanta armeo aktivadis en la provincoj Hebei, Shandong kaj Henan kaj forte batis la registaran armeon. Tiu ribelanta armeo malsukcesis fine sub la kruela subpremado fare de la reganta klaso. Sed rakontoj pri la ribelantoj en la batado kontraŭ lokaj tiranoj kaj korup-

Parto de la pentraĵo "Scenoj apud Rivero en Qingming-festo"



tiĝintaj ŝtataj oficistoj kaj en la helpo al la popolanoj cirkulas eĉ hodiaŭ en Ĉinio.

LA EKONOMIA DISVOLVIGO DE LA DINASTIO

La Norda Song fundamente unuigis centran kaj sudan Ĉinion, restarigis kaj disvolvis la ekonomion, kio iom post iom reprosperigis la socion.

Kreskis la agrikulturaj produktaj fortoj. Kurba sarkilo, fera erpilo, sem-ĉaro kun soko tirata de bruto jam estis ĝenerale aplikataj en norda Ĉinio, iuj kulturaj regionoj de agrikulturaj plantoj estis plivastigitaj. Oni ekkulturis en la basenoj de Jangzi-rivero, la Perla Rivero kaj Minjiang-rivero (en la nuna Fujian-provinco) milion, tritikon, fabon kaj aliajn plantaĵojn antaŭe kreskintajn nur norde de Huaihe-rivero. En la provincoj Jianguo kaj Zhejiang kaj la baseno de Huaihe-rivero oni kulturis bonspecian rizon el Vjetnamio.

Tiam havis rimarkindan disvolviĝon ankaŭ la metalurgia, ceramika, silkteksa kaj aliaj metioj.

Karbo estis grandkvante ekspluatata. Ĝi estis uzata ne nur

en metalurgio, sed ankaŭ en kuirado de ĉefurbaj loĝantoj. Multaj fer-produktejoj uzis karbon kaj en multaj lokoj oni produktis ferajn agrikulturilojn, armilojn kaj ĉiutagajn bezonaĵojn.

Ŝipkonstruado estis grandskala, ĉiujare oni enakvigis 3 000 ŝipojn. La kompasoj jam estis aplikata en marnavigacio.

Ceramiko-farado atingis altan nivelon. Tiam en la lando estis pli ol 30 gravaj bakujoj. La porcelanaĵoj produktitaj de la urbo Changnan de Jiangxi-provinco estis delikataj kaj diafanaj. En la komenco de la 11-a jarcento, t.e., Jingde-erao de imperiestro Zhenzong, la urbo Changnan alinomiĝis Jingdezhen, kaj poste iom post iom disvolviĝis en mondfaman porcelanan urbon. Tiam la ĉinaj porcelanaĵoj jam vendiĝis en Japanio, Koreio, Sud-Azio, Hindio, Arabio, Sirio, Egiptio kaj aliaj lokoj.

Tiam naskiĝis moveblaj presitipoj. Ankaŭ tekstila industrio multe disvolviĝis kaj multiĝis specoj de silkaĵoj.

Samtempe kun tio, ankaŭ la komerca ekonomio disvolviĝis rimarkinde. En iuj grandaj urboj estis multaj butikoj kaj vendejoj.


La ĉefurbo Bianjing fariĝis la komerca centro de la lando, ĉie en la stratoj troviĝis vendejoj, kiuj laboris de mateno ĝis vespero, kaj aperis eĉ matena kaj nokta foiroj.

En la ĉefurba merkato vendiĝis fiŝoj kaj salikokoj el marbordo, bovoj kaj ŝafoj ekster la Granda Muro, silkaĵoj kaj teo el la sudo kaj feraĵoj, porcelanaĵoj, drogherboj, paperoj kaj libroj el diversaj lokoj. Krome, tie vendiĝis ankaŭ japanaj ventumiloj, korea tuĉo, arabaj aromaĵoj kaj perloj.

En la merkato vigle cirkulis kupraj kaj feraj moneroj kaj arĝento kiel valuto. En la meza periodo de la dinastio aperis "Jiaozi", plej fruaj monbiletoj en la mondo.

Sur homplenaj stratoj de Bianjing viglis teatro, rakontistoj, akrobatiko, piedpilkado kaj lukto-prezentado.

Pentristo Zhang Zeduan pentris "Scenoj apud Rivero en Qingming-festo". Tiu longa pentraĵo vidigas tiamajn scenojn en la ĉefurbo dum printempo: Vicoj da vendejoj ambaŭflanke de stratoj, kolportistoj, ĉaroj, ĉevaloj kaj preterpasantoj en senfinaj fluoj.



(Popolrakonto de Baj-nacieco)

Redaktita de YIN JING

LA monto Cangshan estas fama loko en Dali*. De longa longa tempo, inter la popolanoj cirkulas multaj belaj rakontoj pri ĝi.

La monto havas 19 pintojn, el kiuj unu nomiĝas Yunlong. Ĉe ĝi lirlas klara fonto, kiu formis basenon larĝan je 10 metroj. Densaj arbetaroj ĉirkaŭis kaj ombris la basenon, kaj prosperaj branĉoj kliniĝis super la akvo. Ĉiujare en marto kaj aprilo, kiam la arboj floras, la helflavaj floretoj plene kovras la verdajn frondojn. La fonto havas strangan, sed tre belan nomon: Papilia Fonto. Jen legendo pri ĝia deveno.

** Nuna gubernio Dali situas en la provinco Yunnan, Ĉinio. Ĝi estas pitoreska antikva urbo sur altebenaĵo, sin apoganta sur la monto Cangshan okcidente kaj rigardanta al la lago Erhai oriente.*

(1)

Antaŭe la fonto ne estis nomata Papilia Fonto, sed Senfunda Lago, ĉar ĝi estas kristale klara, neniam elĉerpita kaj kvazaŭ senfunda.

Ĉe la lago loĝis kamparano Zhang. Li vivis mizere kune kun sia solfilino. Dum dekoj da jaroj la maljunulo diligente kultivis sian malgrandan terpecon de mateno ĝis vespero, kaj akvumis ĝin per sia ŝvito.

Lia filino Wengu havis 18 jarojn. Ŝi estis tiel bela ke eĉ floroj hontis antaŭ ŝi pro sia modestecco. Ŝiaj okuloj brilis kiel steloj. Ŝiaj nigraj haroj gracie falis kiel delikataj salik-branĉoj. Ŝiaj vangoj ruĝis kiel pomoj. Ŝi estis tre simpatia kaj havis koron puran kiel la klara fonto.

Tage ŝi helpis la patron en kultivado. Nokte ŝi ŝpinis kaj teksis. La ŝtofo teksita de ŝiaj lertaj manoj estis senkompare

Ili verŝas koron unu al la alia.



bela. Ŝia svelta figuro ĉiam viglis en kampo aŭ ĉe la teksilo.

Fame konata ŝi estis pro la diligenteco kaj beleco. Knabinoj prenis ŝin kiel sian ekzemplon, kaj junuloj avidis peti ŝian manon eĉ en sonĝo.

Sur la montpinto Yunlong loĝis juna arbohakisto nomata Xialang. Liaj gepatroj jam forpasis kaj lasis lin sola. Lia diligenteco estis senkompara, kaj liaj saĝeco kaj lerteco superaj. Li estis honesta kaj bonkora. Li havis voĉon belan. Kiam li kantis, ĉiuj birdoj silentis, eĉ pinoj ne susuris, kvazaŭ ĉio en la mondo estus sorĉita de lia ĉarma kanto.

En ĉiu sesa tago Xialang iris vendi brullignon en urba foiro kaj preterpasis la fonton ire kaj reire. Same kiel aliaj junuloj, li tenis profundan amon al knabino Wengu. Ĉiufoje preterpasante ŝian hejmon, li ne povis ne ĵeti amoplenajn rigardojn al ŝi.

Ankaŭ knabino Wengu kore inklinis al Xialang. Kiam li estis kantante preterpasanta la fonton, ŝi tuj ĉesigis teksadon, sin apogis sur la fenestrobreto, amplene sekvis lin per la okuloj kaj absorbite aŭskultis lian belan kanton.

Pasis tago post tago, kaj sincera amo burĝonis en la koro de tiu juna paro.

En iu luna nokto knabino Wengu renkontis Xialang ĉe la fonto. En peza ombro, en arĝenta lunlumo, ili elverŝis koron unu al la alia. De tiam, ili ofte promenadis ĉe la lago kverante.

(2)

Ĉe la piedo de la monto Cangshan estis palaco, en kiu loĝis kruela despoto Yuwang. Li estis la mastro de la monto Cangshan kaj la lago Erhai, kruele eksplua-

tis kaj subpremis la tieajn popolojn. Li havis multajn soldatojn kaj lakeojn por superregi kaj subpremi la popolanojn. La popolanoj morte malamis lin.

La despoto informiĝis pri la beleco de Wengu, kaj decidis preni ŝin kiel sian okan edzinon.

Kun siaj lakeoj la despoto venis al la Senfunda Lago. Ili batvundis la maljunan Zhang kaj forportis lian filinon al la palaco.

“Mia palaco estas abunda je oro kaj juveloj, neelĉerpeblaj frandaĵoj kaj silkaĵoj. Mi garantias al vi riĉan vivon kaj honoran pozicion dum via tuta vivo, se vi edziniĝos al mi,” diris la despoto Yuwang kiel avida hundo al la knabino:

“Antaŭ longe mi jam enamiĝis en arbohakiston Xialang. Per oro kaj juveloj vi ne povas konkuri mian koron.” Kun malesplacito respondis la knabino.

“Hm, mi estas pli potenca ol la ĉielo. La mondo skuiĝos je mia piedbato. Ĉu mi ne superas vian arbohakistaĉon? Se vi ne obeos min, vi ne trovos elirejon,” indigne respondis la despoto.

“Mia amo al Xialang neniam ŝanĝiĝos, same kiel neĝo sur Neĝa Montpinto, malgraŭ via supera potenco kaj mond-skua forto. Bele vi sonĝas, ke mi obeu vin,” firme respondis al li la knabino.

Pasis tri tagoj kaj tri noktoj. La tirano uzis ĉian ruziĝon por minaci kaj allogi la knabinon, tamen li neniam ŝanĝis ŝian fidelecon al la junulo. Kun ĉagreno kaj indigno li ordonis pendigi la knabinon por fleksi ŝin.

(3)

Kun ĝojo kaj espero junulo Xialang venis al la Senfunda



Paro da ĉarmaj papilioj petolas ĉe la fonto.

Lago por rendevui knabinon Wengu. Tamen, anstataŭ ŝian amindan ridetan vizaĝon li vidis ŝian hejmon en malordo. Serioze vundita maljunulo Zhang rakontis al li la okazaĵon per sia lasta spiro kaj mortis.

Doloro kaj malamo brulis en lia koro. Enteriginte la maljunulon, li prenis hakilon kaj kuregis al la palaco de Yuwang.

Profitante noktan mallumon, Xialang grimpis trans la altan muron de la palaco kaj trovis en ĉevala stalo la pendigitan Wengu. Hakrompinte la ŝnuron li subtenis Wengu kaj ili ambaŭ fuĝis de la palaco.

(4)

Wengu kaj Xialang rapide kuregis en mallumo dum la despoto kun ferocaj hundoj kaj soldatoj postkuris ilin.

Kiam ili ascendis monton, ankaŭ la tirano grimpis sur la mon-

ton. Kiam ili sin direktis al valo, ankaŭ la despoto sin pafis tien. Kun aroganteco la despoto kriaciis el la tuta gorĝo:

“Kien ajn vi kuras, vi ne povas eskapi el mia mano.”

Kiam Wengu kaj Xialang atingis la Senfundan Lagon, la tirana grupo ilin kuratingis, ĉirkaŭis kaj devigis ilin submetiĝi.

Wengu kaj Xialang, firme brakumante unu la alian, males-time rigardis la krientajn aĉulojn kaj kune sin ĵetis en la senfundan abismon. . .

Informiĝinte pri la malfeliĉa okazaĵo, la loĝantoj ĉe la fonto prenis armilojn, sturmis la palacon kaj mortigis la despoton kaj ĉiujn liajn lakeojn.

En la sekvanta tago, oni venis al la Senfunda Lago por elakvigi la korpojn de la juna paro. Subite la akvo ŝaŭmis kaj tumultis, el la centro de la lago leviĝis giganta veziko. Sub la veziko estis kavo, el kiu flugis paro da buntaj kaj ĉarmaj papilioj. Ili flirtadis ĉe la lago. Ne longe poste, de diversaj flankoj alflugis sennombraj papilioj grandaj kaj malgrandaj. Ili flugis ĉirkaŭ la lago kaj inter arboj, kompakte sekvante la buntan paron.

De tiam, la Senfunda Lago portas la nomon Papilia Fonto. Ĉiujare, en marto kaj aprilo, belaj papilioj, grandaj kaj malgrandaj, en diversaj formoj kaj koloroj, flugas al la fonto kaj dancas arope. La buntaj papilioj kovras la fonton, la monton kaj eĉ la kampojn. Jen papilia mondo, mirakla pejzaĝo.



Enciklopedieto de Ĉinio

Nacia himno de Ĉinio

de MEI ZHI

Al lukt’,

Ni ĉiuj nesklavvolaj!

Dediĉu l’ sangon por la kre’
de nova Grandmur’!

Nun Ĉinio venas al grava
krizhor’,

Ĉiuj fine devas krei laŭte
kun vengĝjur’.

Al lukt’! al lukt’! al lukt’!

Miloj ni konkorde

Spite l’ malamikkuglojn
marŝu!

Spite l’ malamikkuglojn
marŝu!

Marŝu! marŝu! marŝu!

La nacia himno de la Ĉina Popola Respubliko origine estis nomita «Marŝo de la Volontuloj». Ĝiaj vortoj estis verkita de ĉina dramisto Tian Han kaj ĝia muziko de komponisto Nie Er. La Kanto naskiĝis en 1935.

La «Marŝo de la Volontuloj» estis la temkanto de la filmo «Gefiloj en Kriza Situacio». La filmo rakontis, kiel la ĉinaj intelektuloj vekiĝis de senkonscienco kaj kuraĝe iris al la kontraŭjapana batalkampo en la nacia krizo en la 30-aj jaroj, kiam la japanaj imperiistoj invadis Ĉinion. Tiu scenaro estis skize verkita unue de Tian Han kaj sekve plenumita de dramisto Xia Yan. Juna komponisto Nie Er prenis sur sin la taskon komponi la temkanton por la filmo. Tiam Nie Er estis persekutata de reakciuloj. Antaŭ ol ekveturi al Sovetunio tra Japanio li maldor-

mis tutan nokton kaj verkis rudimentan komponaĵon. Atinginte Japanion, li tuj perfektigis la komponaĵon kaj sendis ĝin al Ĉinio. Nie Er kreeme komponis tiun novan liberan poemon en marŝon kun forta ritmo, alta tono kaj originala stilo. Post kiam la filmo estis publike projekciita, la kanto estis varme akceptata de la ĉina popolo kaj vaste ekcirkulis en la kontraŭjapanaj fronto, malfronto kaj demokratiaj bazlokoj. Tiel ĝi fariĝis la korno por instigi la ĉinan popolon kuraĝe batali kontraŭ la malamikoj.

En 1949, la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco diskutis la projektojn de la nacia himno, kaj la kanto estis elektita. Tiam iuj proponis modifi la tekston, sed la plejparto havis malsaman opinion pro tio, ke la kanto ludis gravan rolon en la historio kaj povas memorigi la popolon pri singardemo en la paca tempo. En la 27-a de septembro de la sama jaro, la konferenco decidis, ke la Ĉina Popola Respubliko provizore prenas la «Marŝo de la Volontuloj» kiel sian nacian himnon.

En 1978 la teksto de la himno estis ŝanĝita. Sed la popolo ne ŝatis la nove verkitan tekston kaj firme postulis, ke oni uzu la originalan. Pro tio, en la 4-a de decembro 1982, la Kvina Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso decidis, ke la «Marŝo de la Volontuloj» kun la originala teksto oficiale servu kiel nia nacia himno.

NACIA HIMNO DE ĈINA POPOLA RESPUBLIKO

(La Marŝo de la Volontuloj)

Teksto de **TIAN HAN**


Melodio de **NIE ER**

Marse Vivece




(Trumpetsolo)


Al



lukt', ni ĉi-uj ne-sklav-vo-laj! De-di-ĉu l' san-gon



por la kre' de no-va Grand-mur! Nun Ĉi-ni-o




ve-nas al gra-va kriz-hor', Ĉi-uj fi-ne de-vas kri-i



laŭ-te kun venĝ-ĵur'. Al lukt'! al lukt'! al lukt'!



Mi-loj ni kon-kor-de Spi-te l' mal-a-mik-ku-glojn mar-ŝu!




Spi-te l' mal-a-mik-ku-glojn mar-ŝu! Mar-ŝu! mar-ŝu! mars'!




Korpo-ekzercaj Terapioj kontraŭ Skapola Periartrito

de HUANG MEIGUANG



(1)



(2)

Skapolan periartriton ofte suferas ĉirkaŭ-50-jaraj homoj. La malsano estas ofte kaŭzita de tirvundo, tordvundo aŭ kronika trostreĉiteco. Ĝia simptomo estas skapolodoloro kaj artika perturbo. La grava kazo estas, ke la suferanto tute ne povas movi siajn skapolo-humerajn artikojn, sed tio estas malofte vidata fenomeno. Por kuraci tiun malsanon oni devas ekzerci ĉefe siajn skapolo-humerajn artikojn kaj samtempe alpreni aliajn terapiojn, kiaj masaĝado, akupunkturado, almeto de plastro, parta hermetiko kaj fizioterapio. Sube ni konigos al niaj legantoj simplajn


korpo-ekzercajn terapiojn, kiujn efike praktikis nombro da suferantoj.

La terapioj estas jene:

1. Ekzerco per gimnastika bastono: Sin ekzerci per ligna bastono longa 1.2 metrojn, helpate de la sana brako:

Ambaŭmane teni la bastonon antaŭ la korpo kaj forte levi ĝin supren, laŭeble, helpate de la sana brako. Ripeti 6-8 fojojn (bildo 1).


Ambaŭmane teni la finojn de la bastono, forte puŝi la malsanan brakon flanke-supren per la



(3)



(4)



(5)

bastono en la sana mano. Ripeti 6-8 fojojn (bildo 2).

Ambaŭmane teni la bastonon horizontale post la korpo kaj forte levi ilin supren, laŭeble etendi la malsanan ŝultron malantaŭen helpate de la sana mano. Ripeti 6-8 fojojn (bildo 3).

Ambaŭmane teni la bastonon vertikale post la korpo, teni la supran parton per la mano de la sana brako kaj la malsupran per tiu de la malsana. Iom post iom forte tiri la bastonon supren por movi la malsanan brakon supren. Ripeti 8-10 fojojn (bildo 4).

2. Murpalpado: Stari kontraŭ muro, meti la manon de la malsana brako sur la muron kaj movi ĝin malrapide de malsupre supren laŭeble por ekzerci la malsanan ŝultran artikon. Ripeti 8-10 fojojn. Stari kun la malsana brako al la muro kaj fari la saman movon per la mano de la malsana brako por ekzerci la ŝultran artikon.

3. Kaŭrado kun mano sur la apogilo de seĝo: Etendi la manon de la malsana brako sur la apo-

gilon de seĝo kaj kaŭri por ekzerci la ŝultran artikon; etendi la malsanan brakon flanken sur la seĝ-apogilon kaj fari saman kaŭradon; meti la seĝon malantaŭ la dorson, etendi la manon de la malsanan brako sur ĝian apogilon kaj fari saman kaŭradon. Ripeti la supre diritajn movojn 4-6 fojojn.

4. Cirkla pilko-svingado: Meti pilkon kun peza internaĵo aŭ du-tri-kilograman sablosakon en retsakon, teni ĝian tenŝnuron per la mano de la malsana brako kaj svingi la sakon cirkle. Dank' al la centrifuga forto de la globo aŭ sablosako la movo povas etendi la ŝultran artikon ĉiudirekten por grandigi ĝian movamplekson. La movado estas konvena al la lasta periodo de ekzercado (bildo 5).

5. Memmasaĝado: Premi la antaŭan, supran kaj flankan partojn de la malsana ŝultra artikon per la dikfingro aŭ manplato de la sana brako, knedi ĝian malantaŭan parton per la aliaj kvar fingroj kaj la bicipson kaj tricipson de la malsana supra brako

per la mano de la sana brako (bildoj 6,7,8).

Dum la ekzercado oni eble sentas partan nefortan doloron. Tio estas normala reakcio. La ekzercado devas esti farata malrapide kaj la amplekso devas esti pliigita iom post iom.

Antaŭ la faro de la korpo-ekzercaj terapioj la suferantoj povas apliki termoterapion. En hejmo oni povas uzi varmakvan sakon por mildigi la doloron kaŭzitan de la ekzercado.


Skapola periartrito estas kronika malsano. Tial oni devas persisti en longtempa ekzercado por akiri kontentigan efikon.



(6)



(7)



(8)

NOVA SUKCESO EN AKVA KAJ GRUNDA KONSERVADO

En la meza kaj supra basenoj de la Flava Rivero troviĝas la provincoj Shaanxi, Shanxi, Gansu, Qinghai kaj Henan kaj la aŭtonomaj regionoj Ningxia kaj Interna Mongolio. En la basenoj kuŝas la Leŭsa Altebenaĵo kun areo de 580 000 kvadrataj kilometroj, inter kiuj 430 000 kvadrataj kilometroj suferas de serioza erozio. Ĉiujare la rivero forportis 1.6 miliardojn da tunoj da leŭso kaj sablo. Tio estis kaŭzita ĉefe de senbrida hakado de arboj kaj detruado de herbejoj en la pasinteco.

Post la Liberiĝo la ĉina registaro donis grandan atenton al bridado de erozio. Ĝi kuraĝigas planti arbojn kaj kreskigi herbojn en la regiono kaj ekpraktikis novan politikon. Laŭ la politiko kiuj plantas arbojn kaj kreskigas herbojn, havas posedrajton pri ili kaj povas heredi la posedantecon. Antaŭ la fino de 1983 en la regiono 1 140 000 familioj laŭ kontrakto plantis arbojn, kreskigis herbojn aŭ konstruis akvomastromajn instalaĵojn sur pli ol 2 000 kvadrataj kilometroj da virga tero. Tial en la lasta jaro la areo de erozioimunaj kampoj atingis ĉ. 8 500 kvadratajn kilometrojn, t.e. 31% pli multe ol tiu difinita en la jarplano. Tio estis la plej alta rekordo en la historio.

DISVOLVO DE KAMPARA INDUSTRIO

La kampara industrio multe disvolviĝis en la lastaj jaroj. En la pasinta jaro la produktovaloro de la kampara industrio atingis 72 miliardojn da juanoj, kun pliiĝo de 11% kompare al tiu de 1982.

Laŭ statistiko de la Ministerio de Agrokulturo, Brutobredado kaj Fiŝkaptado, escepte de Tibeto, el

la ceteraj 28 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj sur la kontinento nur Fujian-provinco informis, ke ĝia produktovaloro de la kampara industrio reduktiĝis en 1983 kompare kun tiu de 1982. Kaj tiu de Pekino kaj la provincoj Anhui, Hubei kaj Guizhou plialtiĝis ĉiu je pli ol 20%.

Ekde 1979, dank' al praktikado de la nova administra sistemo en la ĉina agrikultura produktado, pli kaj pli multaj superflujaj laborfortoj komencis sin okupi pri industrio, transportado kaj servaj entreprenoj. De 1978 ĝis 1982 la jara industria produktovaloro de la ĉina kamparo meznombro pliiĝis je 13.3%. La disvolviĝo de kampara industrio rezultigis prosperiĝon de la ĉina kampara ekonomio.

METANO — GRAVA ENERGIO EN LA ĈINA KAMPARO

29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio produktas metanon. Ĉiujare oni konstruis pli ol 500 000 metanajn basenojn. La ĉinoj jam ellaboris teknologion kaj normojn pri konstruado de la basenoj, kompletigo de fermentigaj instalaĵoj kaj ilia administrado.

Metano produktiĝas ĉefe el rubo kaj fermentinta fekaĵo. En la Guangxi-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono 65% de la kamparanaj familioj ne havas sufiĉan brullignon. En la komenco de la 70-aj la regiono komencis uzi metanon. Nun tie ĉ. 121 000 familioj uzas metanon por lumigi kaj kuiri. Nun oni konstruis tie centrojn por metana esplorado, teknika instruado kaj tiufankaj servoj.

En Hubei-provinco 340 000 kamparanaj familioj uzas metanon.

En Sichuan-provinco metano estas uzata ne nur en lumigado kaj kuirado, sed ankaŭ en produktado de elektro por prilabori agrokulturajn kaj flankokupajn pro-

duktaĵojn. Enketado montras, ke 10 gubernioj de la provinco jam ekuzis metanon por baki tefoliojn kaj grenon, kovi ovojn, kulturifunkojn kaj produkti elektron.

Estas antaŭvideble, ke 100 milionoj da kamparanoj uzos metanon en la jaro 1990.

NOVAJ TURISMAJ SERVOJ

Ekde la kuranta jaro Ĉinio komencis plenumi la novan servon de individua kaj familia turismo. La decidon faris la Internacia Turisma Servo de Ĉinio, la plej granda turisma organizaĵo de la lando, por kontentigi la postulon de eksterlandaj turistoj.

Nun la servo malfermis al la turistoj 80 vojaĝliniojn, ĉiu kun aparta trajto, kiuj kondukas al 80 famaj pitoreskejoj de Ĉinio. Ĝiaj aliaj novaj servoj estas jene:

Ekde decembro 1983 oni praktikas la novan principon, ke la turista grupo ĝuas favoratan vojaĝkoston dum ne-okupata sezono (de decembro ĝis marto venontjare), t.e. 20% da rabato por sinteza servo;

Ekde 1984 oni donas pli da rabato al eksterlandaj turistaj grupoj ĉefe el junaj lernantoj kaj aliaj junuloj;

Estas akceptataj diversformaj konferenca turismo, faka turismo, premiita turismo. Kaj krome, la ĉinaj turismaj servoj peros aferojn konfiditajn al ili de eksterlandaj vojaĝantoj.

Nun Ĉinio jam malfermis 135 turismajn urbojn kun pli ol 300 hoteloj bone ekipitaj kaj 100 000 litoj. En 1983 la turisma servo akceptis turistojn el 140 landoj kaj regionoj.

AMIKECAJ KONTAKTOJ INTER ĈINAJ KAJ ALILANDAJ GEJUNULOJ

En la kuranta jaro diversnaciecaj junuloj de Ĉinio daŭrigos sian

amikecan kontakton kun alilandaj junuloj por akceli ilian reciprokan komprenon kaj amikecon.

En la pasinta jaro la Ĉina Junulara Federacio akceptis 78 junulajn delegaciojn el 30 landoj kaj sendis 30 junulajn kaj studentajn delegaciojn al landoj de la kvin kontinentoj. La Ĉina Junulara Turisma Servo akceptis proksimume 30 000 junajn turistojn de aliaj landoj.

En 1983 pluapaae disvolviĝis kontaktoj de ĉinaj junuloj kun junuloj de diversaj landoj en la tria mondo. Pli kaj pli multaj junuloj de la okcidenta Eŭropo kaj Usono deziras viziti Ĉinion.

Invitite de la Eŭropa Junulara Sindikato, la Ĉina Junulara Federacio sendis sian delegacion viziti 11 eŭropajn landojn, dum la vizito la ĉina delegacio faris kontaktojn kun 84 tieaj junularaj organizaĵoj, kio estis senprecedenca en la historio.

PLI DA NACIMINORITATAJ STUDENTOJ

55 naciminoritatoj de Ĉinio nun havas 53 000 studentojn, kun pliiĝo de 48% kompare kun la nombro de 1978.

La ĉinaj naciminoritatoj kun subevoluintaj ekonomio kaj kulturo loĝas en la regionoj, kiuj okupas 50-60% de la totala teritorio de Ĉinio. Kvankam ilia loĝareo estas vasta, tamen ilia nombro ne superas 10% de la tuta loĝantaro de Ĉinio.

Depost 1978, la edukado por la naciminoritatoj rapide disvolviĝis. Multaj superaj lernejoj malaltigis la normon de enira ekzameno por naciminoritataj kandidatoj kaj samtempe funkciigis preparajn kursojn por naciminoritataj lernantoj. Nun pli ol 1 200 gejunuloj studas en preparaj kursoj de 10 altaj lernejoj rekte sub la Eduka Ministerio.

REGULARO PRI URBOKONSTRUA PLANO

La "Regularo pri Urbokonstrua Plano", publikigita de Ĉinio en januaro, postulas, ke en la urba konstruado devas esti konsiderataj la media protektado, preventado de polucio kaj protektado de historiaj objektoj.

La regularo enhavas en si difinon de la normoj de la urba ekonomio kaj socia disvolviĝo, difinon de la direkto, skalo kaj aranĝo de urba disvolviĝo kaj ĝustan trakton de la rilatoj inter la urbo kaj kamparo kaj inter la produkto kaj vivo.

La regularo postulas, ke oni devas racie disponi teron dum urba konstruado, protekti valorajn kulturajn objektojn kaj vidindajn lokojn kun grava historia kaj revolucia signifo kaj konservi certan kvanton da stratoj kaj konstruaĵoj kun tradicia trajto de koncernaj urboj.

KOMPUTEROJ EN LA AGRIKULTURO DE ĈINIO

De la lastaj jaroj komputeroj estas ekuzataj pli kaj pli multe en la agronomia esplorado, planado pri divido de agrikultura kaj forsta zonoj, administrado de agrikulturaj maŝinoj kaj konsultado pri agrikulturaj informoj. Ili multe helpas nin en modernigo de la ĉina agrikulturo. Krome, komputeroj estas uzataj ankaŭ en esplorado pri grundo kaj rizo.

Dank' al aplikado de komputeroj en konsultado pri agrikulturaj informoj altiĝis la ekonomia efiko de la agrikultura produktado. Lastatempe agronomoj de Zhejiang-provinco sukcese faris transendan sistemon de ĉinaj ideografiaĵoj por konservi, klasifiki kaj indiki informojn pri bonaj rasoj de silkraŭpoj. Ĝi multe faciligas selektadon de bonaj rasoj. Antaŭe la bredistoj bezonis kelkajn mona-

tojn, iafoje eĉ kelkajn jarojn por selekti paron da bonrasaj, bredindaj silkraŭpoj, sed nun du aŭ tri minutoj jam sufiĉas por tio.



Tarifo: 1 internacia respondkuponono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Itala junulo korespondus kun ĉinaj korespondantinoj pri interŝanĝo de opinioj pri ĝeneralaj temoj (kulturo, nuneco, kutimoj, k.t.p.). Adreso: Cavani Tiziano, via Bellaria 335, 41010 Vaciglio, Modena, Italio.

* L. Pohl, Ro=4800 Baia Mare, str. I.L. Karaĝiale Nr. 5/21, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. kun ĉina esp-isto, kiu okupiĝas speciale pri kuracplanta kuracado kaj akupunkturo.


* Maria Jagiello-Dangow, Styczynskiego Nr. 37 M.6, 44-100 Gliwice, Pollando, volas ligi korespond-kontakteton kun samidean(in)o el Ĉinio pri diversaj branĉoj de arto ĉefe pri literaturo, pentrado kaj malnova arkitekturo.

* 44-j. grafikisto dez. kor. pri ĉ. t., kol. e-aĵojn. Joadhim Schulze, Ger. Dem. Resp. 7060 Leipzig, Ringstrasse 71, DDR.

* 11-jara hungara knabino Barbara Hajas, Szomlathely, Baratsag u.

15. 1.6, 9700, dez. kor. kun amik-(in)oj 11-13 jaraj.
- * Michelson Herbster Moura (19-j. studento), Padre Valdevino 711/201, 60000 Aldeota, Fortaleza-Ce, Brazilo, dez. kor. k. interŝ. BK.
 - * 20-jara studento deziras korespondi tutmonde pri ateismo, turismo, muziko ("rock"), kaj lingvistiko. Skribu (esperante, angle, aŭ hispane) al Dwayne Kohn 9840 Lasaine avenue, Northridge, California 91325 USA/Usono.
 - * Deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Adreso: Kollo Edit, Alszeg 615, Ciumani 4207, Harghita, Rumanio.
 - * Jan Ulfik, Aleja Kwiatow 1/17, PL-42-606 Tarnowskie-Gory, Pollando, dez. kor. kaj interŝ. PK, bankobiletojn kaj monetojn kun geamikoj el Ĉinio kaj tutmonde.
 - * Ni ekkreis tutmondan komerc-kooperativon sub la komercnomo "Bonan Tagon" kaj serĉas novajn membrojn. Niaj nunaj produktoj: "Belaj svisaj horloĝoj". Adreso: Bonan Tagon, Quai Du Bas 92, CH-2500 Bielo, Svislando.
 - * Mezaĝa kuracistino Terasa Janowska, ul. Em. Plater 12/14, 00-669 Warszawa, Pollando, dez. kor. tutmonde pri div. temoj kaj interŝ. modelojn de popol-arto kaj esperantaĵojn.
 - * 22-jara turka studento pri elektrotekniko Eyup Kartalci, peter-Hilleweg numero 11/421, D-4790 Paderborn, Fed. Resp. Germanio, volonte korespondus pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj.
 - * 19-jara studento Kent Huff, 1836 Dalton St., Alcoa, TN 37701, Usono, deziras korespondi kun geamikoj sovetiaj, polaj, hungaraj, ĉeĥaj, rumanaj kaj bulgaraj, kaj pri politiko, komunisma kaj kapitalisma idealoj, fremdlingvoj, k.t.p. Povas korespondi esperante, angle kaj ruse.
 - * Rene Dorr, 25 Arenue du General Leclerc, 36110 levroux, France, deziras korespondi kun ĉina esperantisto.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Wenjiang-gubernio
2. Zhangjiakou
3. Xuanhua
4. Jinan
5. Jinzhou
6. Xi'an
7. Dali
8. La Feniksa Monto

第四课

Kvara Leciono

1. vortoj

han-lingvo	han-lingva fonetika alfabeto	Esperanto
从 ¹ (prepozicio)	cóng	de
哪里 ² (pronomo)	nǎli	kie
来 (verbo)	lái	ven-
意大利 (landnomo)	Yìdàlì	Italio
人 (substantivo)	rén	ano (homo)
吗 ³ (partikulo)	ma	ĉu

2. teksto

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

林红: “你从哪来?”

Lín Hóng: “Nǐ cóng nǎli lái?”

vi de kie ven-

Lin Hong: “De kie vi venis?”

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

安娜: “我从意大利来。”

Ānnà: “Wǒ cóng Yìdàlì lái.”

mi de Italio ven-

Anna: “Mi venis de Italio.”

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

林红: “你是意大利人⁴吗?”

Lín Hóng: “Nǐ shì Yìdàlìrén ma?”

vi est- italo ĉu

Lin Hong: “Ĉu vi estas italo?”

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

安娜: “是⁵, 我是意大利人。”

Ānnà: “Shì, wǒ shì Yìdàlìrén.”

jes mi est- italo

Anna: “Jes, mi estas italo.”

Klarigoj:

- “从” (cóng) estas prepozicio. Per ĝi oni povas enkonduki vorton signifantan punkton de spaco, de kiu komenciĝas iro aŭ revenas iu.
- “哪里” (nǎli) estas pronomo kaj unu el ĝiaj sencoj estas “kie” aŭ “kiu loko”. Metinte “从” antaŭ ĝi, oni formas vortgrupon “从哪里” por demandi “de kie?” aŭ “de kiu loko?”
- “吗” (ma): partikulo. En la frazo ĝi estas mallaŭte legata. Oni metas ĝin ĉe la fino de la simpla indika frazo por fari demandon.
- “意大利人” laŭvorte “ano de Italio”.
- Tiun vorton vi jam konis en la tria leciono, kie ĝi signifas “est-”. Ĉi tie ĝia senco estas “jes” — jen alia uzo de la vorto “是”.

Noto: En la vortlisto, ni aldonas vortspecon al ĉiu vorto laŭ ĝia senco en la teksto. Se la vorto estas plursenca kaj apartenas al malsamaj vortspecoj, ni montros tion per koncerna klarigo.

ĈE LA URBO ZHANGJIAKOU

de LI PING

NIA trajno transrampis montaron ĉe Badaling kaj, post ĉ. kvar horoj da veturo nordokcidenten, atingis Zhangjiakou, gravan nordan pordon de Ĉinio. La loko estis strategie grava kaj probatalata de antikvaj militistoj.

INTERKRUCIĜANTAJ MUROJ

Historia libro notis, ke konstruado de la Granda Muro komenciĝis en la periodo de Militantaj Regnoj. Jam en tiu tempo, t.e. la kvara jc. a. K., la regnoj Yan kaj Zhao ekkonstruis ĉe Zhangjiakou murojn por defendi sin kontraŭ invado de nordaj naciminoritatoj. Nun tie videblas la ruino de la muro de Yan, nome alarmturoj, kiuj distancas ĉ. cent metrojn inter si. Nur ĉe intermonto staras peco da tera muro, kies nedifektita parto altas kvar metrojn. Tio estas la plej aĝa muro, kiun mi propraokule vidis.

Post sia unuigo de Ĉinio en 221 a. K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio interligis la murojn de Yan kaj Zhao kun tiu de Qin kaj rekonstruis ilin. Postaj dinastioj grandskale konstruis tie interkruciĝantajn murojn.

Ming-dinastio (1368-1644) estis la lasta konstruanto de la Granda Muro. Ĉe Zhangjiakou serpentas 500-kilometra muro kaj parto de la muro restas sendifekta.

En tiu dinastio oni laŭ lokaj kondiĉoj faris la muron, kiu iras okcidenten laŭmonte. Ĝian parton sur la monto oni konstruis el ŝtonpecoj, tiun sur la ebenejo el ramita tero kaj tiun ĉe la gravaj pasejoj el brikoj, kaj en iuj lokoj oni ĉirkaŭhakis rokojn por servi ilin kiel muron.

Dajing-pordego en Zhangjiakou estis unu el la gravaj pasejoj de la Granda Muro de Ming-dinastio. La muro starigita tie en la jaro 1485 altas je dek metroj. Ĝi etendiĝas laŭmonte ĝis la limo de du montoj, kie impone staras gvatturo. Qing-dinastio (1616-1911) konstruis tie alian pordegon kiel la nordan pordon por defendi la ĉefurbon Pekino kaj la pordego fariĝis grava trapasejo kunliganta landinternon kaj limregionon.

La vespera krepusko ruĝigis Dajing-pordegon apud la kruta monto. Miajn okulojn frapis la vortoj "Belegaj Riveroj kaj Montoj" sur la horizontala tabulo super la pordego. Suprenirinte

la pordegon laŭ ŝtuparo, mi povis rigardi tre malproksimen kaj prenis la tutan urbon per la okuloj.

URBO DE PELTO

Antaŭe oni diris, ke la loko havas tri trezorojn: terpomon, nudan avenon kaj pelton. Hodiaŭ ĝi estas ankoraŭ fama pro sia pelto.

La industrio de ledokaj peltoj de Zhangjiakou havas longan historion. Ĝia komerco ekzistas de Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.), ĉar la loko estas proksima al la stepo de la Interna Mongolio.

De tre longa tempo preskaŭ ĉiuj familioj okupiĝis pri tanado de feloj. En la antikveco la lokanoj faris basenojn ĉe la piedo de Woyun-monto por maceri felojn en malvarmeta fontakvo. Ili tanis la felojn puraj kaj molaj. Antaŭ 200 jaroj, por danki la fontakvon, oni konstruis la Halon de Akva Diino kun ŝia statuo. Pri ŝi estas multaj kortuŝaj legendoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio rapide disvolviĝis la industrio de ledokaj peltoj de la urbo kaj multe kreskis ĝia eksporta kvanto. Ĝiaj ŝafidaj peltoj ven-

diĝas en dekoj da landoj de Sudorient-Azio, Eŭropo, Afriko kaj Latin-Ameriko. Pro sia bona kvalito ili, markitaj nur per "Zhangjiakou", povas eksportiĝi sen ekzameno.

Mi vizitis la Unuan Peltan Fabrikon de Zhangjiakou, kiu, ekipita per avangardaj maŝinoj, aplikis novan teknikon. Antaŭe oni uzis gluan milion kiel materialon por preparado de pelto, sed nun praktikas kemian procedon, kiun sukcese disvastigis inĝeniero de la fabriko post eksperimentado. Tiamaniere oni multe altigis la kvaliton de la peltoj.

La peltoj de la urbo estas famaj ankaŭ pro sia posta delikata prilaboro. Veteranaj tanistoj estas tre lertaj en la prilaborado. Ili per malsamaj metodoj prilaboras malsamajn felojn. Nemaŭ multaj el ili fariĝis respondeculoj de diversaj niveloj, kaj iuj verkas por doni sian sperton al posteuloj.


Granda estas la Tapiŝfarejo de Zhangjiakou. La unua ore brila tapiŝo, kiun Ĉinio eksportis, estas ĝia produktaĵo.

En la farejo laboras plejparte junulinoj. Rigardante la elegantajn tapiŝojn kaj murtapiŝojn faritajn per iliaj lertaj manoj, mi sentis min kvazaŭ en muzeo de arto.

Mi intervjuis laboristinojn ĉ. 25-jaran kun bela vizaĝo. Ŝi diris al mi: "Mane teksti tapiŝon ne estas tiel facile, kiel oni pensas. Al tio ni devas dediĉi grandan energion. Sed tia tapiŝo estas vera artaĵo, por kiu ni volonte oferas kiom ajn da energio."

ANTIKAŬA URBO ABUNDA JE VINBEROJ

Post ĉ. unu-hora aŭtoveturo suden de Zhangjiakou mi atingis



Dajing-pordego en Zhangjiakou

Xuanhua, antaŭe gubernion de Hebei-provinco kaj nun distrikton de la urbo. Ĝi havas longan historion kaj prosperigis en Ming-dinastio. En la vaste etendiĝanta norda landlima regiono la dinastio starigis naŭ strategie gravajn urbojn. Inter ili estis Xuanhua, kiu metis sub sian administradon parton de la Granda Muro kelkcent kilometrojn longan kun pli ol 60 pasejoj kaj fariĝis grava loko por defendi nordan Ĉinion.

En la centro de Xuanhua staras Qingyuan-turo konstruita en la jaro 1482. La turo alta je 24.5 metroj havas tri etaĝojn kun verandoj kaj suprenflugantaj tegmentanguloj aspektantaj kiel birdaj flugiloj. Inter la antikvaj konstruaĵoj ĝi estas tre originala. Mi vidis sur ĝi kupran sonorilon 2.5 metrojn altan kaj pli ol kvin tunojn pezan. Laŭdire, oni povas aŭdi ĝian sonoradon eĉ en loko 20 kilometrojn fore.

Sur la turo mi direktis la okulojn suden kaj vidis ne malproksime antikvan konstruaĵon fratan al Qingyuan-turo. Ĝi estas Zhen-shou-turo (aŭ tambur-turo), je duonjarcento pli aĝa ol Qingyuan.

Mi venis al Xuanhua ĝuste en la sezono de vinber-maturiĝo. Ĉie videblis vinberujoj, ĉu ĉe stratoj kroĉe al domoj aŭ arboj, ĉu ekster la urbo. La kontinua bildo harmoniis kun la kvietaj riveroj.

Tie la vinberujaj latlatisoj en ronda formo aspektas kiel malfermitaj grandaj ombreloj super la tero. Tre plaĉas grapoloj kaj grapoloj da vinberoj inter larĝaj folioj. La vinberoj de la loko estis premiitaj en la Panama Internacia Foiro en 1905 kaj enviĝis inter la valoraj vinber-specoj de la mondo. Ĉiujare Xuanhua eksportas ĉ. 400 000 kg. da vinberoj.

Cirkulas multaj legendoj pri ĝiaj vinberoj. Jene estas unu el

SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO



ili: En la regperiodo de la Han-dinastia imperiestro Wudi (140—86 a.K.) la fama ĉina sendito Zhang Qian revenis el la Centra Azio, kun tri vitoj. En furioza sabla vento li perdis la vojon. Li vagis al Xuanhua kaj trovis, ke sub la sablo estas fekunda grundo. Iu maljunulo tiam iris al li kaj vidis la tri vitojn. Li tre amis kaj volis akiri ilin. Zhang diris al li: “La trezorojn mi kunportis post malfacilega vojaĝo. Mi esperas, ke vi bone kulturos ilin, por ke ili donu fruktojn al posteuloj.” Post trijara diligenta laboro de la maljunulo la vitoj ekdonis dolĉajn vinberojn.

Legendo restis legendo. Antaŭe la loko estis fama pro sia furioza sabla vento. La loĝantoj batalis kontraŭ la vento generacion post generacio. Ili starigis ŝirmajn murojn kaj kulturis post ili vinberujojn, kaj tiel turnis la legendon en realon.

SUR STEPO

Bashang-stepo en la nordo de Zhangjiakou estas parto de la stepo de la Interna Mongolio ĉe ĝia rando. Ĝi, abunda je grasaj herboj, servas kiel bela kaj riĉa natura paŝtejo, kiu multe disvol-

vas sian brutobredadon kaj provizas la peltan urbon per sufiĉaj krudmaterialoj.

Mi venis al ĝia Chabei-paŝtejo, kiu fondiĝis en 1950. Tiam oni okupiĝis ĉefe pri multigo de purrasaj ĉevaloj kaj ŝafoj importitaj el Sovetunio. Por prosperigi sian aferon, la paŝtejo starigis dum la lastaj tri jardekoj mez- kaj malgrandajn tapiŝfarejojn, laktaĵofabrikon, agrikulturilan fabrikon kaj gren-prilaborejojn.

La maljuna paŝtejestro Xu Changjin afable akceptis min. Li regalis min per bongusta ŝafo. Antaŭ 30 jaroj li eklaboris en la paŝtejo kaj tre bone konis ĝin. Dum nia trinkado li rakontis al mi ion ordinaran sed korduŝan.

Veterinaro Shi Yukun estis diplomita de altlernejo. Jam en la juneco ŝi ekpraktikis sian profesion en la paŝtejo. La longa laborado grizigis ŝiajn harojn. Dum la lastaj 20 jaroj ŝi senĉese serĉis sperton por bonigi la ŝafspecon kaj fine sukcesis koni la seksardon de ŝafo laŭ ŝanĝiĝo de ĝiaj dorsharoj. Ŝia eltrovo ricevis altan takson de specialistoj kaj per tio ŝi kontribuis al sia afero.

Frumatene la paŝtejestro min akompanis al la stepo por kolekti fungojn. La fungoj de la loko estas tre valoraj, bonodoraj kaj karnodelikataj. Ili servas kiel unu el la ĉefaj ingrediencoj por bongusta plado. Ili, grupe kreskantaj kaj portantaj blankan “ĉapon”, aspektas tre plaĉaj.


En lia akompano mi ankaŭ pririgardis instalaĵojn de la paŝtejo. Min interesis elektra barilo funkciigata de sunenergio. Oni starigis la barilon inter gresejoj paŝta kaj herbokulturata por gardi la herbejon de tretado de gregoj kaj laŭplane renovigi la herbojn. Eĉ la plej petola bruto ne kuraĝas duafoje proksimiĝi al la barilo, se ĝi nur unu fojon tuŝas ĝin.

Estis malpeza nebulo kaj malsekaj alblovoj. Sur malproksimaj montodeklivoj paŝtiĝis gregoj da bovoj kaj ŝafoj. En mian memoron subite venis jena fragmento de fama ĉina antikva popolokanto:

*Sub la ĉielblu' sen baro
la paŝtejo vastas kiel maro.
Kiam vent' klinigas herbojn,
ekaperas bovoj kaj ŝafoj en
aroj.*


LA URBO ZHANGJIAKOU

Fotoj de CAI HAIFENG




Granda Muro apud
urbo Zhangjiakou


Ruino de la Granda Muro




Pejzaĝo de Linzhi en la antaŭurbo de Zhangjiakou




Metiejo de peltaĵoj






Parto de la urbo



En tapiŝofabriko





Antikva gamo-sonorilaro ludata

Solo de popola kanto



DANCOJ AKOMPANATAJ DE GAMO-SONORILARO



Ĉas-danco



Ludantino de gamo-sonorilaro

Festena danco de Chu-regna palaco



8/15 IV

